



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
95-a jaro • n-ro 1148 (6) • Junio 2002

Estrara raporto: UEA en 2001



**Landaj Asocioj
kolonoj de UEA**

**Faka Agado:
Kompreni kaj agi**

**Konferenco
en Kalifornio**

Esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
Telefona kaj telefakska:
+421 43 4222 788
Retpoŝto: revuo@uea.org

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 32; USD 30; JPY 3300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

Anoncartarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefakska: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: http://www.uea.org

Aganta Ĝenerala Direktoro:
Trevor Steele.

Vi trovos...



ke nia buso iras plu kaj eĉ rekaptis la regulan horaron. Ŝanĝiĝis nur la ŝoforo (bv. ne timi, li ne estas absoluta novico), la karoserio ricevis novan lakon, sed el la fenestroj (kiuj ricevis nur iom aliajn kadrojn), oni plu povas admiri novajn regionojn de nia Esperantujo... Post pensiga malfermo de nia prezidanto ni vizitos kelkajn Landajn Asociojn kun Michela Lipari, tra Faka Agado ĉiĉerono Detlev kaj Wera Blanke, post eta miraklo (tempa retroiro al 2001 en formo de Estrara Raporto) ni pluveturos kun Stefan MacGill al interesa konferenco en Kalifornio, vizitos la UEA-Libroservon por vidi la novaĵojn... – Bonvolu komforte ekvidi! Kantado permesita! Serĉataj estas ĉiĉeronoj por la venontaj ekskursoj!

Enhavo

- 123 MALFERME: Lingvaj homaj rajtoj (Renato Corsetti).
- 124 Landaj Asocioj – la kolonoj de UEA (Michela Lipari).
- 126 FAKA AGADO: Kompreni la neceson kaj agi laŭ tio (Detlev kaj Wera Blanke).
- 128 ESTRARA RAPORTO: UEA en 2001. Enkonduko: Ekster la dezerton! (R. Corsetti)
- 129 Administrado: La jaro de Ŝanĝoj (Ans Bakker-ten Hagen). Informado: Interreta aktiviĝo (A. Grigorjevskij). Kongreso: Sub alta protekto (I. Osibov). Faka agado: Pruvi la aplikon (I. Osibov). La Komitato: Ĉu kompletigota?
- 131 Rilatoj kun TEJO: Novaj impulsoj (I. Osibov). Landa kaj Regiona agado: la aferoj antaŭeniras.
- 133 Edukado: ILEI komisiita edukati. Eksteraj rilatoj: Ĉefe Unesko kaj EJL.
- 134 CED: Notinda pliaktivigo (H. Tonkin). Spozkontoj – bilanco.
- 136 INSTRUADO: Ni observis, raportis kaj planis (Stefan MacGill).
- 137 Oratora konkurso de UEA. Disvastigo: informi la neesperantistojn (R. Corsetti).
- 138 LOKE. FAKE. PERSONE.
- 139 OFICIALA INFORMILO. ANONCETOJ.
- 140 RECENZIOJ: Wolfgang Kirschstein pri La tago kiam Jesuo perdis Judason de Manuel de Seabra; Máire NicAoidh pri la kompakta disko Flugu falko.
- 141 LASTE APERIS.
- 142 FORPASOJ. Krucenigma Konkurso (Kivio).

FRONTPAĜE: Al la plej sukcesaj aranĝoj en 2001 sendube apartenis la 17-a Aŭstralia E-Somerkursaro en Melburno, Aŭstralio (legu pli en la marta pasintjara revuo). Sur la bildo estas internacia grupo dum festa manĝo: Dimitar Haĝiev (Bulgario), Miranda Lutz (Aŭstralio), Hong Hanh Trinh (Vjetnamio), Joyce Tamasee (Samoo), Teleri Holton (Aŭstralio), Stanley Iko Snam (Papua Novgvineo), Reinhard Kurz (Germanio) kaj Penny Vos (Perto, Aŭstralio). Foto: Jennifer Bishop

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategia forumo, Unesko): d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39-06-957-57-13; f+39-06-957-66-33; renato.corsetti@esperanto.org.

Vicprezidanto (strategio kaj planado, UN Novjorko): prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford, CT 06107 Usono; ☎+1-860-561-26-69 [h]; f+1-860-561-52-19 [h]; ☎+1-860-768-44-48 [of]; f+1-860-768-44-11 [of]; tonkin@mail.hartford.edu.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎+82-53-765-0880 [h]; +82-53-652-4488 [of]; f+82-53-652-8141 [of]; +82-53-765-0881 [h]; lee@esperanto.net.

Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun TEJO, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjoj): s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio; ☎+385-(0)21-535-650 [h];

+385-(0)21-355-550 [of]; f+385-(0)21-393-597 [of]; osibov@pravst.hr.

Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎f+31-(0)20-642-18-53; ans.bakker@esperanto.org.

Eduko, kulturo, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado: s-ro Gbego Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎+228-27-21-17; esp.togo@cafe.tg.

Informado: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Ŝumerija, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎+7/83536/59856; andreo@mail.ru.com.

Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98; f+39-06-39-72-61-69; michela.lipari@esperanto.org.

Observanto de TEJO: s-ro Marko Naoki Lins.

Observanto de ILEI: s-ro Maŭro La Torre.

Malferme

Lingvaj Homaj Rajtoj

Renato Corsetti

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unu kontraŭ alia...

Tion diris Zamenhof en la konata parolado en la londona Guildhall en la jaro 1907-a. Preskaŭ unu jarcento pasis de tiam, jarcento plena je la plej teruraj teruraĵoj, kiujn certe Zamenhof ne povis imagi, jarcento plena je teruraj plenumitaj ne de popoloj postrestintaj kaj vivantaj en profundaj ĝangaloj, sed de homoj laŭ komuna sento plej civilizitaj.

Ankoraŭ hodiaŭ se vi legus la verson Popolo popolon atakas kruele, vi povus kredi, ke ĝi estis ĵus verkita por priskribi okazajn de ĉi tiuj tagoj. Sed eĉ io pli malbela okazas, laŭ mia kompreno, ĉar malgraŭ la paso de unu jarcento la proponantoj de perforta solvo de ĉio solvinda, la proponantoj de la lego de la ĝangalo, nun kiel tiam ne hontas pri si mem. Ili eĉ fiere anoncas, ke ili estas la avangardo de progreso kaj tutmondigo, kaj ke estas nature ke fortoj kaj efikuloj regu kaj aliaj regatu.

Mi jam aŭdas iujn, kiuj demandas kaj admonas: Kiel tio rilatas al Esperanto? Ĉe ni oni parolu pri kulturo kaj ne pri politiko! Tamen, karaj geamikoj, ni perdidus Zamenhof-on kaj liajn ideojn pri egaleco inter la popoloj, finfine la nebulan sed tre fortan internan ideon de Esperanto, se ni ne agas ankaŭ en ĉi tiu epoko surbaze de tiuj ideoj.

Tio estas esence la kialo, pro kiu UEA decidis nun lanĉi la kampanjon Lingvaj Homaj Rajtoj. Ĝi volas esti ampleksa informkapanjo, kiu ree proponu la uzon de la internacia lingvo Esperanto kiel ilo de justeco, eventuale ankaŭ – sed ne nur – kiel ilo de efikeco. Al kiu ĝi proponu Esperanton? Mia respondo estas: Al ĉiuj! Simple, laŭ mi estas erare veti sian tutan proponon sur unu numero. Estas erare aserti, ke nur Eŭropo triumfigos Esperanton aŭ ke nur lingvistoj donos al ni la venkon aŭ ke nur per laboro ĉe la brazilaj amasoj, ktp. aŭ ke nur per la praktika uzado en turismo ktp. Neniu el ni havas la monopolon pri la vero. Ĉiuj ideoj estas respektindaj, ĉar en ĉiu el ili estas parta vero. Simple ni devas kombini la tradiciajn desuprison kaj desubismon, kaj toleri, ke aliaj havas ideojn tute malsimilajn je niaj. Ankaŭ ili eble parte pravas avantaĝe al Esperanto.

Vi scias, ke kelkaj neesperantistoj, kiel Tove Skutnabb-Kangas kaj Robert Phillipson, kaj aliaj ĉirkaŭ ili provas lanĉi la koncepton pri Lingvaj Homaj Rajtoj. Ni, kies pioniroj inventis tiun koncepton antaŭ ol la koncepto mem pri Homaj Rajtoj naskiĝis, provu ligi Esperanton al ĝi en la mensoj de la homoj. Esence la celo estas, ke post iom da

tempo, kiam oni aŭdos la vorton Esperanto, oni aŭtomate pensos: Ah, jen ree tiuj, kiuj okupiĝas pri lingvaj homaj rajtoj!

Vi scias, ke oni jam komencis labori en tiu direkto. La Komunika-Centro en Bruselo, malgraŭ sia terura nomo, provas fari ĝuste tion. UEA ĵus eldonis Esperanto-dokumenton pri Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj. Se vi volos traduki ĝin al via lingvo kaj disvastigi ĝin al viaj samlandanoj, tio povus esti via unua ago por ĉi tiu kampanjo. Kontakto UEA-n tiucele.

Ĉiukaze la kampanjo Lingvaj Homaj Rajtoj konsistu el pluraj kunordigitaj agadoj (kaj la listo estas nur komenca listo):

- Provo atingi, ke UN diskutu la NRO-rezolucion de Seŭlo, kiu petas, ke oni (la Socia kaj Ekonomia Konsilantaro de UN) serioze pristudu la problemojn de internacia help-lingvo.

- La agado lingvo de paco kaj dialogo kadre de la Jardeko por kulturo de paco 2001 – 2010 de Unesko kaj UN, kies oficiala partnero UEA estas. Ĝi esence baziĝu simple sur ofertado de retaj Esperanto-kursoj al NRO-oj kaj al individuoj, ĉefe en militaj teritorioj, sub la ŝildo de tiu Unesko-kampanjo, kaj sur aliaj iniciatoj kiuj provos ekstigi dialogon inter malsamaj civilizoj.

- Lingvaj homaj rajtoj estas la koro de la inform-kampanjo al intelektuloj, ĵurnalistoj, politikistoj, normala publiko. Ĝi konsistu el informpakaĵo, kunmetita de ni kaj vaste donacata tra la mondo, kaj el anoncoj en gazetoj. La celo de la anoncoj, kompreneble, estu la lingvaj homaj rajtoj, sed per la fina adreso oni kunligu ilin al Esperanto.

Kiel mi havis jam okazon diri aliloke, persone mi estas nur profeto sen armiloj kaj UEA povas fari nur tion, kion vi faros en ĝia nomo. Por efektiviĝi ĉi tiun programon ni bezonas vin ĉiujn, individuajn membrojn, asociajn membrojn kaj nemembrojn. Ni bezonas tiujn, kiuj havas informistajn kapablojn por redakti la anoncojn, ni bezonas tiujn, kiuj havas komputilajn kapablojn, por verki la anoncajn TTT-paĝojn, ni bezonas tiujn kun organiza kapablo kaj kun financa kapablo, ni bezonas ĉiujn landajn asociojn kaj ĉiujn lokajn klubojn. Unuvorte ni bezonas ĉiujn esperantistojn de bona volo por klopodi ŝanĝi la bildon de Esperanto ĉe la tuta publiko. Kontakto min aŭ miajn estrarajn kolegojn aŭ la oficistojn de UEA kaj ofertu vian helpon.

Nia adreso por la papera poŝto kaj ankaŭ niaj ret-adresoj estas en ĉi tiu revuo.



Ĉilia Esperanto-Asocio

Estis elektita nova, kvinkapa estraro. La retadreso: esperanto@terra.cl aŭ informaciones@esperanto.cl, la hejmpaĝo: <http://esperanto.cl>. Ekzistas ĝenerala diskutlisto: chile-esperanto@gruposyahoo.com.ar kaj aliaj por la estraro kaj por la junularo. La sidejo estas ĉe esperantisto. Funkcias biblioteko kaj la katalogo estas en preparo. La asocio ne havas libroservon. La bulteno *La Verda Sago* ne plu aperas papere sed nur rete, por ŝpari monon. Aliĝintaj estas 11 membroj, el kiuj 6 estas individuaj membroj de UEA. La kongreso okazos ĉiun duan jaron en Santiago; en la alterna jaro estas organizataj naciaj renkontiĝoj en aliaj regionoj de la lando. Ekzistas 10-leciona kurso en la reto kaj aŭtodidakta kurso. La ĉefa problemoj: manko de Cseh-instruistoj kaj problemoj pagi la kostojn por tion atingi.

Esperanto Nederland

La retadreso estas: sekretario@esperanto-nederland.nl. La retpaĝoj (du): www.esperanto-nederland.nl (asocia hejmpaĝo) kaj www.esperanto-info.nl (ĝenerala informo pri Esperanto en la lando). La sidejo estas luita, la biblioteko estas parto de la Universitata Biblioteko en Amsterdam. La bulteno, *FEN-X* aperas 6-foje jare kaj havas 12 paĝojn A4. Aniĝis 469 membroj, ekzistas 14 lokaj grupoj kaj 2 fakgrupoj. La estraro devus esti 6-membra, sed pormomente ĝi estas nur 4-kapa. La landa kongreso ne okazas; en majo okazas jarkunveno kun kvindekda partoprenantoj; en oktobro okazas la Faulhaber-semajnfino (kultura, sociala kunveno) kun cent da partoprenantoj; krome okazas 2-foje jare diversnivela studsemajnfino kun ĉ. 30 partoprenantoj. La




Post la Ĝenerala Membrokunveno la 25-an de majo 2002 Dafydd ap Fergus, ĵurnalistoj kaj oficisto de la Brusela Komunikad-Centro, prelegis pri siaj agadoj. Els van Dijk, estrarano de Esperanto Nederland dankas al la preleginto.

Landaj Asocioj - la kolonoj de UEA

Universala Esperanto-Asocio konsistas el Individuaj Membroj, kiuj rekte pagas sian kotizon, kaj kolektivaj membroj de Landaj kaj Fakaj Asocioj. En tiu ĉi rubriko ni prezentas al vi la Landajn Asociojn.

ĉefa atingo - informado pri Esperanto al nederlandanoj. La ĉefa problemoj: manko de homfortoj, sed malgraŭ la malfacilaĵoj la estraranoj estas tre entuziasmaj!



Esperanto-Asocio de Estonio

La retadreso: tonuhirsik@neti.ee. La sidejo estas komuna kun aliaj asocioj. Ekzistas biblioteko kun ĉ. 250 volumoj kaj libroservo. La bulteno, eldonata 4 fojojn jare kun amplekso de 10 paĝoj, nomiĝas *Informoj de EAE*. Aniĝis 35 membroj: MA 22, Mj 6, MG 5, MAT 2. Estas 4 lokaj grupoj, la estraro estas tri-membra kaj la konsilio 12-membra. La landa kongreso okazas ĉiujare kaj daŭras unu tagon.

La ĉefa atingo: eldono de Estona-Esperanto-vortaro kaj Estona Enciklopedio. La ĉefa problemoj: malgranda kresko de la membraro kaj manko de mono por organizi retan adreson kaj konatigan paĝon.

Unuiĝo Franca por Esperanto

La retadreso: esperanto-france@esperanto.org; la hejmpaĝaro: www.esperanto-france.org. Funkcias pluraj oficialaj diskutlistoj pri diversaj fakoj. UFE havas propran sidejon en la centro de Parizo. En ĝi laboras libervoluloj kaj unu dungito. Ne funkcias biblioteko, sed jes libroservo. Eldoniĝas: monata bulteno *Okazas*, franclingva, por informi la membrojn pri la okazaĵoj rilataj al Esperanto, ĉefe enlande; ses-foje jare aperas *Le Monde de l'Espéranto*, parte Esperante, parte france, kolora, kiu informas ne nur pri Esperanto sed ankaŭ pli ĝenerale pri lingvaj problemoj. Aniĝis 1 000 simplaj kaj abonantaj membroj. Tra tuta Francio ekzistas regionaj federacioj en kiuj membras pluraj lokaj grupoj. La estraro estas 5-kapa. La landa kongreso okazas ĉiun jaron, 3-4 taga. Ekzistas perkorespondaj kursoj: unua-, dua- kaj triagrada. Iuj regionoj havas la propran. La ĉefa atingo: la UK en Montpellier; Pasintjare: Euroscola-tago en Esperanto; lanĉo de nova bela revuo *Le Monde de l'Espéranto*; sukceso havi

du pagitajn dungitojn per Stata mono. La ĉefa problemoj: varbi novajn membrojn por havi pli fortan kaj efikan asocion; trovi pli da aktivuloj, ĉar pli da porĵoj estas malfermitaj al Esperanto ol oni kapablas puŝi. La espero/deziro de UFE: organizi Universalan Kongreson en Lille en 2005.

Helena Esperanto-Asocio

Ĝi ne havas retadreson, retpaĝon, nek oficialan diskutliston. La sidejo estas luita, ekzistas biblioteko kun preskaŭ 500 volumoj, ne ekzistas libroservo. Ne estas eldonata bulteno, membroj estas 209. Ne ekzistas lokaj grupoj. La estraro estas 7-persona. La komitatano kaj ĉefdelegito ĉe UEA estas Maria Pontika. Ne ekzistas perkoresponda kurso.

Japana Esperanto-Instituto

Ĝi havas hejmpaĝon: www.2s.biglobe.ne.jp/~jei/esperanto kaj propran sidejon. Ekzistas biblioteko, listiganta ĉ. 15000 titolojn, kaj libroservo. La bulteno nomiĝas *La Revuo Orienta* kaj ĝi estas eldonata 12-foje jare kun amplekso de 40 paĝoj. La membroj estas 1388, dividitaj inter normaj, subtenaj, familiaj, junularaj, dumvivaj.

Ekzistas 46 filioj (urbaj grupoj). La landa kongreso okazas 1 fojon jare kaj daŭras 3 tagojn. JEI aŭspicias korespondan kurson. La ĉefa problemoj estas stagno aŭ malgrandiĝo de la membraro. Kaj la ĉefa atingoj... tio estas surprizo, kiu estas anoncota en venonta ĉapitro de la libro 'nia familio'.


Kanada Esperanto-Asocio

La retadreso: esperanto@canada.com. La hejmpaĝo: www.esperanto.ca. La sidejo estas propra (ĉe esperantisto). Ekzistas biblioteko kun 401 volumoj en Sidney kaj en Halifax troviĝas Libraro Ludovika (la prizorganto S.T. Norvell), multe pli ampleksa. La libroservo troviĝas en Montreal. La bulteno *Lumo* aperas ĉiun trian monaton kun amplekso de 40 paĝoj. Krome aperas du novaĵleteroj en la franca kaj en la angla, ĉiun trian monaton, *Esperanto Update* kaj *Aujourd'hui l'Espéranto*.

Membroj estas ĉ. 160. Ekzistas formalaj grupoj en tri urboj, aliloke aktivas neformalaj grupoj. La estraro estas 9-persona. Kongreso okazas neregule, plejparte ĉiun duan jaron. La komitatano estas Paul Hopkins, la ĉefdelegito Olga Du Temple. Ekzistas perkoresponda kurso. La ĉefa atingo: levo de la ĝenerala kono pri Esperanto tra la lando, kaj gajno de prestiĝo por ĝi. La ĉefa problemoj: la aliĝanta membraro kaj manko de volontuloj.

Kartvelia Esperanto-Asocio (KarEsA)

La retadreso: karesa@mail.ru. La hejmpaĝo: www.geocities.com/abuladze_2000/karesa/start.htm. La sidejo estas ĉe la prezidanto, la biblioteko ĉe la sidejo, ĉ. 300



volumoj, krom periodaĵoj. Ekzistas libroservo, la 24-paĝa bulteno *Kaŭkazo* (dulingva) aperas 4-fojojn jare. 25 individuaj kaj 40 asociitaj membroj, 5 lokaj grupoj, 7-persona estraro. La landa kongreso okazas ĉiun 3-an jaron kaj daŭras 1-2 tagojn. Ĉefaj atingoj: 1. Estis finredaktita Esperanta lernolibro en 24 lecionoj; 2. eldonitaj diversaj libretoj, vortaretoj, gramatika resumo, frazaro, ktp. 3. la asocio ekhavis sian hejmpaĝon. Ĉefa problemoj: manko de oficejo; manko de monrimedoj por financi studprocezon, pro la samaj kialoj oni ne havas eblon partopreni en internaciaj E-renkontiĝoj.

Korea Esperanto-Asocio

Retadreso: keast@soback.kornet21.net, hejmpaĝo: www.esperanto.or.kr. Ĝi havas propran sidejon, ekzistas biblioteko kun ĉ. 1100 volumoj kaj funkcias libroservo.

La bulteno *La Lanterno Azia* estas eldonata 11 fojojn jare (20 paĝoj). Membroj estas 250 (el kiuj dumvivaj 138), lokaj grupoj estas 12 kaj la estraro estas 20-kapa.

La landa kongreso okazas ĉiun jaron kaj daŭras du tagojn. La komitatano ĉe UEA estas Lee Chong Sae, la ĉefdelegito Ma Young-tae. Ne ekzistas perkoresponda kurso. La ĉefa (planata) atingoj: inviti kaj plenumi la 79-an UK-on.

La ĉefa problemoj: manko de kompetentaj movademuloj kaj financa malfacilo.

(Kompilis Michela Lipari, daŭrigota)



Membroj de Korea Esperanto-Asocio - partoprenantoj de la lasta Zamenhofa festo en Seulo.



Kompreni la neceson kaj agi laŭ tio

En la aprila kajero de la revuo (4/02, p.75) Ivo Osibov prave elstarigis la gravecon de praktika utiligo de Esperanto kaj aparte de la faka agado.

Ni volas reveni al la temo kaj menciigi kelkajn problemojn ligitajn al ĝi. Eble per ĉi tiu malkompleta kontribuo estiĝos diskuto, i. a. pri tio, kiel por siaj planitaj agadoj en la periodo 2001-2004 UEA al si havigu klaran kaj deklaran politikon pri la faka apliko de Esperanto (Esperanto 10/01, p.165).

Laŭ ni oni ja lernu el la pasinteco, el ties pozitivaj rezultoj kaj el ties eraroj. Necesas novaj impulsoj, por aktualigi niajn potencialojn. Konsciente, ke la sube menciitaj demandoj kaj ideoj tute ne estas novaj (kaj ke certe multe pli, ol oni povas menciigi en ĉi revuo, jam okazas en la reto) ni tamen opinias, ke la temoj daŭre meritas diskuton. Jen kelkaj konsideroj.

Pri la valoro de ampoemoj

Ja estas ĝojiga fakto, ke la Esperanto-movado disponas pri relative riĉa kaj bonkvalita beletro, kiu grave kontribuis al la evoluo de nia lingvo kaj estas por ties uzantoj fonto de guo kaj riĉigo. Sed ni ne estas certaj, ĉu la esperantistaro samgrade konscias pri la neceso de ĝisdata kaj adekvate evoluinta faka lingvo. Jam la malekvilibro inter la felice produktata kvanto de romanoj, noveloj kaj poemaroj unuflanke kaj la malmultaj fakaj tekstoj aliflanke montras la preferon. Sed ni ja scias, ke la ĉiutaga vivo de ni ĉiuj pli kaj pli estas influata de nebeletraj teknikaj kaj alifakaj faktoroj kaj premoj. Se nia prezidanto Renato Corsetti kun sia specife komprenenda humoro en sia novjara mesaĝo skribas: *Unu sociolingvistika aŭ esperantologia verko devus same valori kiel unu poemo de enamiĝinta komencanto*, tiam estiĝas la demando, ĉu finfine ni havu tiom da fakaj verkoj kiom ni havas ampoemojn de komecantoj? Estas fakto, ke la ĉefa kvanto de parolaj aŭ skribaj tekstoj, produktitaj en la organoj de Eŭropa Unio, estas fakaj aŭ almenaŭ havas fortan fakan trajton. Kompreneble, se oni nur volas ĝui la lingvon kun siaj amik(in)oj, oni apenaŭ bezonas fakajn tekstojn. Se oni tamen volas proponi al la mondo alternativan komunikilon por internaciaj rilatoj, la ŝancoj esti konsiderata alternativa modelo kun la nuna nivelo de la faka apliko de Esperanto estas tre modestaj. Por ke ne estu miskompreno: Ni estas por ampoemoj kaj por komecantoj. Eĉ pli: ni esperas pri multaj komecantoj kiuj

poste verkos ampoemojn kaj... el kiuj multaj fariĝu diverstemaj fakuloj!

Ĉu denove inventi la radon?

Ŝajne la pludonado de valoraj spertoj el la pasinteco ne trovas sufiĉan atenton. Tro logas la tento (re)inventi la radon. Se temas pri la faka agado: ŝajnas, ke iam – en tempoj sen reto – ĝi estis multe pli brila ol nun. Memoru ekzemploj pri la sistema kaj tre tekstoprodukta aranĝaro *Someraj Universitataj Kursoj* (SUK), kiu dum la 70/80-aj jaroj en Lieĝo realigis abundon da fakaj prelegoj kaj sumerkatigis preskaŭ 40 brilajn prelegkajerojn sen komplika burokratio. Ĉu nuntempe ne eblas tia aranĝaro?

Alia ekzemplo: Kiel ni ofte povis konstati, relative nekonata restis la serio de sep altnivelaj fak-aplikaj kokolvoj sub la mallongigo (S)JAEST ((S)eminario) Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), kiu okazis inter 1978 – 1984 en Ĉeĥoslovakio, kun eldono de la prelegvolumo. Ne eblas sufiĉe laŭdi, ke antaŭ nelonge Petro Chrdle revivigis tiun tradicion kaj ĉijare okazigos jam la 3-an KAEST (kie K signifas Kolokvo aŭ Konferenco), sub la tre aktuala kadra temo *Elektronikaj rimedoj* (8.-10.11.02, informojn donas chrdle@kava-pech.cz). La KAEST-oj okazadas ĉiun paran jaron sub aŭspicioj de UEA kaj krom la kerna temo en la unua sekcio ili pritraktas en pliaj du sekcioj tradiciajn temojn *Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de esperanto kaj Scienco kaj tekniko ĝenerale*.

La eldonitaj volumoj de la unuaj du bone frekventitaj KAEST-oj (*Modernaj rimedoj de komunikado* 1998, kaj *Fakaj aplikoj* 2000) apenaŭ vendatas. Kial tia manko de intereso kaj ...de solidareco?

Ni ne havas veran superrigardon pri la ĉefa faka literaturo produktita en Esperanto. Tio kaj koncernas monografiojn (kvankam bonvenas la ĉi-rilataj listoj en *Eventoj* – tamen bibliografie ofte malkompletaj) kaj aparte la fakajn artikolojn disemitaĵajn en multaj fakaj revuoj. Ĉu faka asocio ne devus okupiĝi pri tia materialserĉado kaj kompili taŭgan bibliografion? La lasta bibliografio eĉ de fakvortaroj aperis en la 60-aj jaroj (Haferkorn)! Esperable baldaŭ aperos en la reto la aktualigita bibliografio de vortaroj de Esperanto, valorega kompilaĵo



Ekzemploj de gravaj lastjaraj fakaj E-eldonaĵoj: Terminologia gvidilo, baza manlibro por terminologoj, UEA, EUR 5,70 kaj prelegkolektoj el du lastaj KAESToj 1998 kaj 2000 kun resumoj en la angla, la germana kaj la ĉeĥa lingvoj. KAVA-PECH, po EUR 15.-.

de Edward Ockey, publikigita la unuan fojon (kiel manuskripto) en la jaro 1982. En la reto ĝi estos daŭre aktualigebla. Sed ĝis nun mankas fidinda superrigardo pri fakaj tekstoj.

Kiel solvi komunajn problemojn?

Fakaj asocioj havas amason da similaj problemoj, sendepende de la fako: kiel trovi samfakulojn, ekscii pri farita laboro, aranĝi konferencojn, eldoni bultenojn kaj revuojn, redakti kaj publikigi monografiojn kaj vortarojn, kunlabori kun neesperantistaj partneroj, ĉerpi financojn el neesperantistaj fondaĵoj, administri membrojn, utiligi la retan ktp.

Ja bonvenas la forumo de fakaj asembleoj kadre de la UK-oj. Sed ĝi laŭeble estu strukturita kaj ĉefe ebligu la spertintersaĝon pri komunaj fakaj bazaj problemoj. Siatempe eldoniĝis iu interfaka bulteno, nun certe realigebla en la reto (aŭ eble jam realigata?). De tempo al tempo releviĝas la postulo pri multflanka, sciencostrategie kaj sciencorganize kapabla oficisto en CO, kiu kompetente kaj sisteme priservu tiun fakan agadon sur la komuna nivelo.

Por kiuj ni publikigu?

Restas malfacila la demando, ĉu aktivi por tre limigita aro da specialistoj aŭ pli larĝe, popularscience, por pli granda klientaro. Certe ambaŭ aspektoj necesas. Tio aparte estas problemo por la vendendaj publikaĵoj. Iuj tre alte specialigitaj materialoj ja povus aperi etkvante, resp. en la reto. Sed ni bezonas bonan, modernan popularsciencan revuon. Ni memoru pri la revuoj *Homo kaj kosmo* (Beogrado) kaj *Fokuso* (Budapeŝto). Ĉu eblas pluevoluigi la tradicion *Scienca Revuo*, laŭ la kvalito de la prezento kvazaŭ krucante ĝin kun *Kontakto kaj Monato*, por ke ni havu vere interesan magazinon? Eble tiam troviĝus pli da abonantoj.

Kiel atingi profesiecon?

Jen demando, kiu rilatas niajn aranĝojn, niajn eldonaĵojn, nian aperon en fakaj neesperantistaj medioj ktp. Ĉu vi estas fakulo pri tiu aŭ jena temo? Bone, fakulo ja pretendas pri profesieca nivelo. Certe ankaŭ vi malaprobis, ke aperadas fakaj vortaroj sen uzabla enkonduko, libroj sen ISBN, revuoj sen ISSN. Aŭ ke mankas klara indiko pri redaktisto, eldonejo kaj eldonjaro, ke eĉ malestas iuj kutimaj redaktaj normoj, ideo pri la utilo de ailingvaj resumoj ktp. Literaturindikoj ĉe fakaj verkoj foje estas katastrofaj. Tiu kiu devas bibliografi esperantaĵojn por neesperantistaj profesiecaj farataj bibliografioj, ja ofte ne tre bonfartas...



Parto de la publiko dum la konferenco KAEST 1998 en Ĉeĥio kun la temo *Modernaj rimedoj de komunikado*.

Kiel baki fakvortojn?

Jen malnova sed absolute centra problemo, kiu montras kiom fora de profesieco estas la esperantistaro en kelkaj rilatoj. Se oni konstatis bezonon kaj sentas emon pligi specialan kampon, necesas unue rigardi, kio jam okazis sur la plugota tereno kaj nur poste konkludi kion fari. Ni timas, ke oni foje forgesas pri tio. Por taŭge nomi nociojn oni bezonas ne nur findindajn difinojn sed ankaŭ adekvatajn lingvajn rimedojn kaj la scion, kiel uzi ilin. Ni ne estas la solaj, kiuj multfoje skribis pri la neceso de sistema terminologia laboro. Ja tre dezirindas la konsidero de internacie rekonataj gvidlinioj por kompili fakvortarojn aŭ terminarojn (kio ne estas la sama). Tio restas temo, kiu devus interesi ĉiujn fakajn asociojn. Ja temas pri tri aspektoj: a) la ĝeneralaj principoj de terminfarado, sendepende de la fako kaj lingvo; b) la interdisciplina kunagado kaj interkonsento; c) la fake kaj lingve specifaj demandoj.

Kiam en 1985 fondiĝis la Terminologia Esperanto-Centro TEC, estis grandaj planoj kaj klopodoj. Ŝajne de ili nenio restis. Tio tamen estas eraro. TEC ja publike atentigis pri problemoj kaj necesoj, vekis certan intereson kaj konscion ĉe la fakuloj kaj eĉ havis kelkajn konkretajn rezultojn. Kaj ĝi ankaŭ montris, kio ne funkcias. Laŭ tio lerneblas. Fakte ĉiam denove leviga voĉoj postulantaj la revivigon de TEC. Tamen, strange, ne troviĝas laborpretaj homoj por tia pretendema laboro.

Klopodoj rete starigi terminologian diskutiston ne montriĝis sufiĉe fruktodonaĵ. Se ni ne eraras, regule pri terminologio oni diskutadas nur en la kadroj de KAEST-oj (vidu supre).

Sen terminologia agado ni ne havos la profesiecan kvaliton kaj la necesan kvanton de fakvortaroj, nemalhaveblan por aperi sur internacia scenejo kiel serioza partnero. (Ni varme rekomendas la *Terminologian Gvidilon* de Suonuuti kaj pretas sendi al interesatoj materialojn pri la temo.)

Kie la junularo?

Nu, tio estas ĝenerala krio, ĉiam ĝusta. Ĉi tie ĝi levas gravan demandon: *Kial konataj kaj talentaj junuloj (ofte kun akademijaj titoloj kaj pozicioj) tiom malestas fake aktivadi?* Ĝuste ili per sia scio kaj plej novaj ekonoj, ne laste en la mondo de la elektronikaj medioj, plej ofte superas nin, la pli frue naskitojn. Ĉu ni eble tro malvolonte cedas respondecajn postenojn, ekz. tiujn de estro de faka asocio, de redaktisto de iu revuo, bulteno ktp.?

En universitataj kursoj kaj seminarioj pretiĝas multaj kapablaj junuloj. Kaj tamen fakte mankas fake aktiva studenta movado, kie junaj intelektuloj povus elprovi sin kaj trovi motivojn por aktivadi ankaŭ en la estonto. Kiu klopodos iom kunordigadi kaj impulsi la universitatan agadon?

Detlev kaj Wera Blanke



Prof. Sachs (DE) prezentas sian kontribuon pri rara specio de krabo vivanta en arbo uzante multajn interesajn ilustraĵojn.



raportas
la respondecaj
estraranoj

UEA en 2001

Karaj membroj individuaj kaj asociaj,

en la mitoj de pluraj popoloj oni havas transiron de maroj, de montaroj aŭ de dezertoj fare de la malgranda grupo de prapatroj en la plej fora antikveco. Esperantistoj ne estas escepto. Ankaŭ ni havis niajn periodojn de transiroj. Ni transiris la unuan mond-militon, ni transiris la periodon inter la du mondmilitoj, ni transiris la duan mondmiliton, ni transiris la dividon de la mondo en du blokoj. Dum la lastaj jardekoj ni havis eĉ pli malfacilan transir-periodon. Ni devis transiri la perdon de celoj kaj sekve la perdon de klara marŝo-direkto kaj la perdon de kuraĝo. Antaŭ la graviĝo de la pozicio de nur unu etna lingvo, kiu emas forpuŝi ĉiujn aliajn, ni restis dubantaj pri nia funkcio, kaj okupiĝis ĉefe pri ni mem.

Mi havas la plezuron informi vin, enkonduke al ĉi tiu agad-raporto, ke laŭ mi ĉi tiu lasta transir-periodo estas finiĝanta. En la tuta raporto vi trovos detalojn pri la okazintaĵoj de la pasinta jaro. Mi nur diru resume, ke nia asocio feliĉe superis serion da organizaj problemoj, kaj en la nova jaro ĝi prezentiĝas refondita kaj preta al novaj taskoj. Mi kaptas la okazon por bonvenigi la novajn direktoron, redaktoron kaj oficistojn en la Centran Oficejon kaj en la laboron por la Asocio ĝenerale. Sub malfacilaj cirkonstancoj Trevor Steele

Enkonduke Ekster la dezerton!

kiu ekoficis en Zagrebo, kaj kiu prezentas ĝuste tiurilate tre interesan gamon da talentoj. Mi ne bezonas paroli pri ili, ĉar ili pruvis siajn kapablojn tra la jaroj.

Nun necesas, ke ni ĉiuj faru kroman klopodon por adaptiĝi al la novaj situacioj en la mondo kaj en la movado.

transprenis trankvile kaj klare vide la rimenojn kaj Stano same facile ekredaktis la revuon. Ilia laboro certe estas jam rimarkita de la legantoj de ĉi tiu raporto. Mi volas ankaŭ danki la aliajn oficistojn, kiuj restas en siaj postenoj kaj daŭrigas la laboron por la Asocio.

Tamen, eĉ tio en si mem ne estus kialo por historia turno-punkto. Tio, kio igas la novan situacion pli interesa, estas la fakto, ke la movado ŝajnas retrovi sian senton pri la direkto, ke ni ŝajnas ekvidi la kampojn, kiuj kuŝas ekster nia dezerto, ke ni volas eliri el la dezerto kaj iri al la urboj de la homoj, ĉar nia tasko estas konvinki tiujn homojn kaj ne nin mem. Kaj ĉi tie mi menciu la novan estraron,

La malnovaj organizaj strukturoj bezonas renovigon. La tuta mondo de lernantoj en la komputila reto bezonas taŭgan medion por evoluigi siajn interesojn en Esperanto. La ideo de Zamenhof pri paco inter la batalantaj gentoj bezonas modernan veston, kiu tamen gardu ilian centran mesaĝon. La

esperantistoj bezonas reakiri la certecon, ke ilia agado estas utila al ili mem kaj al la mondo.

Unuvorte ni nun devas pli celkonscie okupiĝi pri informado, instruado kaj utiligado. Tiujn prioritatojn la komitato en Zagrebo aprobis, kaj ili estas nun parto de la laborplano de UEA. En tiu laborplano ili estas detalitaj en pluraj eroj, kies konkreta realigo estas jam survoje. La Komunikad-Centro en Bruselo estas unu el tiuj eroj.

Permesu al mi fine mencii la centran rolon, kiun en nia strategio havas la junularo kaj la instruistoj/instruantoj de Esperanto. La junularo esperantista, kaj ĉefe tiu organizita en TEJO, estas la plej konkreta garantio, ke ni sukcesos adaptiĝi al la nova mondo. Mi certas, ke ili faros sian parton. Pri la instruistoj kaj ilia graveco ni ĉiuj estas konvinkitaj.

En ĉi tiu spirito estas por mi agrable danki ĉiujn esperantistojn, kiuj laboris por Esperanto dum la pasinta jaro, kaj aparte tiujn, kiujn mi rekontis en Zagrebo pasintjare, kaj bonvenigi ĉiujn al la ĉi-jara Universala Kongreso en Fortalezo, Brazilo.

Ek al la komuna laboro!

Renato Corsetti



Personaro

La jaro 2001 estis jaro de ŝanĝoj. Ĝi estis ne nur elektojaro por nova estraro. Okazis ankaŭ adiaŭo de fidelaj oficistoj.

Pensiigis Rob Moerbeek post 32 jaroj da sindediĉo al multaj laboroj en la Centra Oficejo. (Esperanto, aprilo 2001.) En decembro Simo Milojević atingis la aĝon por pensiigo. Tamen ambaŭ plimalpli restis: Simo forlasos la postenon de estro de la Libro-Servo kiam en 2002 novdungiĝo eklaboros tie. Rob daŭrigas asistadon en pluraj ĉiutagaj laboroj en la oficejo. Speciale korektado de eldonaĵoj (kiel ĉi tiu revuo) estas lia profesia ŝatokupo.

La estraro nomumis inter si oficejan komisionon. Ĝi konsistas el: vicprezidanto Humphrey Tonkin, ĝenerala sekretario Ivo Osibov kaj estraron por financo kaj administrado Ans Bakker-ten Hagen. La triopo estis komisiita kunordigi la proceduron por dungi novajn oficistojn. Samtempe ĝi analizis la funkciadon de la CO, la servojn kiujn la Asocio havigu al siaj membroj kaj al la cetera mondo. Kiel la kvaran komisionanon ĝi invitis Marko Naoki Lins, observanton por TEJO en la estraro de UEA.

Montriĝis ke la etoso en la oficejo estas streĉa. La komisiono faris ĉion eblan por plibonigi tiun situacion.

Kiel agantan ĝeneralan direktoron la estraro elektis el pluraj altkvalitaj kandidatoj Trevor Steele. Li estas homo, kiu povas kunordigi teamon kaj ĝin stimuli pozitive.

Osmo Buller finis plurajn taskojn antaŭ ol oficiale forlasi la CO-on (en 2002). Ankaŭ Pasquale Zapelli ĝis la lasta momento (en 2002) de sia deĵorado restis aganta por la Asocio.

Lia posteno de direktoro ne estas malvakigita. La estraro atendas la rezultojn de la analizoj pri taskoj.

Kvankam István Ertl volis demisiigi plej laste en la monato junio 2002, la estraro elektis novan redaktoron jam ekde januaro 2002. Tiel Stano Marček prizorgos minimume unu plenan

prizorgis volontuloj. TEJO havis sian volontulon ĉijare el Usono.

Ekipaĵo, domo

La direktoro, kun helpo de Fred de Geus kaj teamo de volontuloj, daŭrigis la konstruadon de nova komputila sistemo. Pri la domo kiel Centra Oficejo la estraro, kune kun la ĝenerala direktoro (kaj la stabo) diskutos post analizo de la funkcioj kiuj okazu centre.

Administrado La jaro de ŝanĝoj

jarkolekton de la revuo. Li promesis akuratiĝi la aperadon.

Komence de la jaro la oficeja stabo konsistis el 11 personoj, ĉe la fino estis 10. Krome prizorgis la oficejon s-ino Mercej, kiu post 32 jaroj da laboro tie emeritiĝis fine de decembro.



Rob Moerbeek

Kiel regulaj volontuloj kunlaboris 3 personoj. Krome aro da volontulaj helpantoj estis en la oficejo plurfoje. En la Libro-Servo dum tri monatoj volontulis Xiang Hong sendita de Ĉina Esperanto-Ligo. TTT-efojn de UEA daŭre

Servoj

La jarlibro 2001 ampleksis 300 paĝojn. La Revuo Esperanto aperis 11-foje. La aperdatoj ne estis tiom regulaj kiom dezirata. La nova redaktoro promesis tion ripari.

Kontakt, la dumonata socikultura periodaĵo de TEJO, ekhavis novan redaktoron: Jenja Zvereva, Ukrainio. Ĝin presas nun Skonpres, Pollando.

La Libro-Servo aperigis katalogon en papera formo. Ĝi estas konsultebla ankaŭ rete. Rete ankaŭ pli kaj pli aperas mendoj por la LS. Pro la populariĝo de komputiloj la estraro volas uzi ilin por komunikado kun la membroj, ne forgesante tiujn kiuj ne havas konekton kun la reto. Ĝi ankaŭ devas iel eviti ke retroŝtatoj tro postulu tujtujan servadon en la Centra Oficejo.

Dufoje la Centra Oficejo malfermis la pordon por tielnomata Malferma Tago. Tiu iniciato de la iamaj direktoroj montras ke interesa programo kaj la okazo por revidi geamikojn garantias ĉiam denovan sukceson. Ankaŭ en la vendoj de la libroservo! Ĉi tie ni dankas al ĉiuj, kiuj per sia profesia aŭ volontula laboro plu servadis la membrojn kaj subtenadis la agadon de UEA en la mondo.

Ans Bakker-ten Hagen

Dum la raporta periodo UEA ĉiam pli aktive uzis la modernajn komunikadajn eblojn, prezentatajn de Interreto. Por tio estis lanĉitaj aŭ prizorgataj kelkaj retaj dissendolistoj, dediĉitaj al informado.

Ekzemple estis funkciigita dissendolisto E-inf, en kiu estis publikigataj informoj kaj artikoloj, taŭgaj por ekstera informado. Pluraj el tiuj informoj estis represitaj de la naciaj E-periodaĵoj.

Pli aktive estis uzata la retejo www.uea.org, en kiu regule aperis aktualaj informoj pri la preparado de Universala Kongreso, kaj *Gazetaraj Komunikoj* de UEA.

En januaro 2002 en la retejo estis prove publikigita

elektronika versio de la revuo *Esperanto*. Por postaj numeroj post pridiskuto en la subkomitato de UEA pri informado estis akceptite publikigi nur po unu-du artikolojn.

Sekve de tiuj agadoj la kvanto de la vizitoj al la retejo duobliĝis dum kelkaj monatoj kaj en aprilo 2002 superis 10 mil.

Laŭ iniciato de Humphrey Tonkin estis renovigita dokumento *Gisdate pri Esperanto*.

Roy McCoy en la CO petadas tradukojn en kiel eble plej da naciaj lingvoj de *Gisdate*, por ke ĝi, same kiel la Manifesto de Prago, estu havebla por la informla laboro de landaj asocioj kaj lokaj kluboj per simpla peto al UEA.

Andrej Grigorjevskij

Informado Interreta aktiviĝo

★ Kongreso ★ Sub pinta protekto

En la 86-a UK en Zagreb partoprenis 1691 kongresanoj el 57 landoj kaj 46 unutagaj aliĝintoj. La solenan inaŭguron ĉeestis la alta protektanto, la kroata prezidento Stjepan Mesić mem, kiu en sia salutparolado trafis menciis kialojn por lerni, disvastigi kaj uzi Esperanton.

En 9 forumoj estis preparolitaĵoj plibonigo, pliiintensigo kaj plilarĝigo de la agadoj divers-regionaj kaj diverskampaj. Tradicie okazis diversaj fak-kunsidoj kaj renkontiĝoj. La Internacia Kongresa Universitato kun sep prelegoj de renomaj sciencistoj donis konojn pri lingvistiko, astronomio, literaturo, ekonomio, muziko kaj edukado. La kongresanoj ĝuis atmosferon en nacia kaj internacia vesperoj, 5 koncertoj, 2 filmoj kaj 3 teatraĵoj.

La Kongreso donace postlasis al Zagreb ŝtonan monumenton *La futuro*, verkon de la skulptisto Jesper Neergaard.

Ekstera publiko atente sekvis la Kongreson. La landskala kaj lokaj televidoj, radio-stacioj kaj ĵurnaloj abunde raportis pri la Kongreso publikigante multajn artikolojn kaj intervjuojn kun kongresanoj. La plej granda ĵurnalo *Večernji list* havis ĉiutagan prikongresan rubrikon.

Ivo Osibov



Stjepan Mesić

★ Faka agado ★ Pruvi la aplikon

La Komitato en Zagreb aprobis la kontraktojn pri kunlaboro kun du pliaj fakaj asocioj: Astronomia Espertanto-Klubo kaj Monda Jumeiĥo-Societo. Ĉesis funkcii Internacia Esperanto-Klubo Esperantista. Sekve estis 8 aliĝintaj kaj 39 kunlaborantaj fakaj asocioj, krome du fakaj sekcioj de TEJO. Ni registras ankaŭ 33 fakajn asociojn kiuj ne havas rilatojn kun UEA. La menciitaj fakaj organizaĵoj disponas minimume pri 34 ttt-paĝoj, ĉu memstaraj, ĉu en la kadro de aliaj organizaĵoj aŭ institucioj movadaj kaj ekstermovadaj. Ili povas servi kiel bazo por uzigi la lingvon al la membraro en diversaj fakoj, por informi la eksteran publikon pri la lingvo kaj por pruvi al la samfakanoj neesperantistoj la ekziston kaj aplikon de Esperanto.

Kvardeko da diversaj fakaj organizaĵoj organizis siajn kunvenojn en la Zagreba UK, pridiskutis siajn organizajn fakajn demandojn kaj atestis la uzadon kaj uzeblecon de Esperanto en plej diversaj medioj.

Enketo entreprenata inter la fakaj asocioj intencas konstati la spertojn de la fakaj asocioj, la formojn kaj eblecojn de la

koncerna faka laboro, kunlaboro kun samprofesiaj neesperantistaj organizaĵoj internaciaj kaj naciaj, problemoj renkontataj k. s. Iliaj respondoj povos esti bazo por plua planado kaj realaj esperoj pri la estontaj direktoj, amplekso kaj dinamiko de la faka agado.

Ivo Osibov

★ La Komitato ★ Ĉu kompletigota?

Post la elektoj en 2001 la Komitato konsistis el 55 komitatanoj A, 7 komitatanoj B kaj 12 komitatanoj C, sume 74 komitatanoj. La Komitato ne estis kompleta, ĉar ne ĉiuj Landaj Asocioj nomumis siajn komitatanojn A. Estis ankaŭ 13 observantoj. Ok LA ne nomumis siajn observantojn. La kunsidojn dum la UK en Zagreb partoprenis 60 komitatanoj aŭ iliaj anstataŭantoj. 84% de la komitatanoj estis ligitaj al la reta diskutlisto de la Komitato. La komitatanoj estis informataj pri la okazaĵoj en la Asocio pere de komunikaĵoj kaj komitataj cirkuleroj.

La Komitato de UEA dum la UK en Zagreb decidis eksperimente formi 7 subkomitatojn taskitajn pri diversaj agadkampoj. La intenco estis ke ĉiu komitatano aliĝu al unu (almenaŭ) subkomitato. La tasko de la subkomitatoj estas dum la tuta jaro (ne nur dum la semajno de la UK) dum la trijara mandatperiodo pridiskuti problemojn, iniciati solvojn, prepari kaj proponi decidojn al la Komitato kiel tuto. Ili funkcias dumjare koresponde, ĉefe rete, ĉar plimulto de la komitatanoj havas retaliron. Okaze de la komitatokunsidoj

en la kadro de la UK la subkomitatoj funkcii kiel kaj anstataŭ la ĝisnunaj laborgrupoj. Al la subkomitatoj aliĝis entute 128 anoj, iuj komitatanoj al pluraj. Krome kelkaj nekomitatanoj partoprenas en ilia laboro. La aliĝado al la subkomitatoj daŭris longe, tial nur lastatempe ili komencis vigli.

★ Rilatoj kun TEJO ★ Novaj impulsoj

TEJO sukcese okazigis la 57-an IJK-on en Strasburgo kun preskaŭ 400 partoprenantoj el 35 landoj de 5 kontinentoj dediĉitan al la kongresa temo *Plurlingvismo en Eŭropo: kiel ĝin sukcesigi?* Dum la Kongreso estis, interalie, preparolita strategia programo de TEJO, akceptita KolombEJO kiel la 43-a landa sekcio de TEJO kaj elektita nova estraro.

En novembro 2001 en Svedio okazis sukcesa TEJO-seminario *Esperanto@Interreto*. Alia seminario estis organizita en marto 2002 en Litovio pri *Aktiva civitaneco*. Ĝenerale viglas la interretaj servoj de TEJO kun tute nova adreso: www.tejo.org. Nova *Pasporta Servo* aperis kun pli da gastigantoj ol iam ajn antaŭe. Aktivuloj de TEJO kunlaboris en internaciaj junularaj konferencoj, dise en la mondo, informante pri Esperanto kaj serĉante kunlabor-eblojn. La revuo *Kontakto*, redaktata de nova redaktarino, regule aperas kombinante sukcesajn tradiciajn elementojn kun novaj ideoj. *TEJO-tutmonde* daŭre prezentis la ĉefajn movadajn agadojn de TEJO. Ekde 2001 aperas la reta bulteno de TEJO *TEJO-aktuale*, kiu aktuale, koncize, senpage raportas pri junularaj temoj.

Estrara raporto 2001



★ Landa kaj ★ Regiona agado La aferoj antaŭeniras

Ameriko



Solena malfermo de la 5-a Tutamerika Kongreso en Meksikurbo en aprilo 2002. foto: James Rezende Piton

La okazigo de la Tutamerika Kongreso en Meksiko estis certe la plej grava atingo. Partoprenis en ĝi ĉirkaŭ 150 esperantistoj el pluraj mondopartoj, de azianoj ĝis eŭropanoj, krom, evidente, la amerikanoj. Grava rezulto estis interne de la movado la fondo de la junulara sekcio de la meksika asocio, kaj ekstere la lanĉo de la esperantlingva traduko de grava verko pri la konkero de Ameriko far eŭropanoj, vidata el la perspektivo de la indiĝenoj.

La ebleco kunigi kaj inter si paroligi reprezentantojn de pluraj centramerikaj landoj, rezultigis vigligon de la agado, pli bonan kunlaboron. Ekzemple tre bone utiligataj estas la diversaj retaj diskutlistoj de la kontinento, kio donas novan kaj fortan elanon en la laboro, ekzemple al la kolombia movado, kies junulara sekcio, KolombEJO, estis akceptita kiel nova landa sekcio de TEJO.

Dum la sama IJK eniris la estraro de TEJO venezuela aktivulino, Mayrim Sandoval, respondeca pri landa agado. Ankaŭ en Honduraso rimarkeblas vigliĝo de la Esperanto-agado dank' al aktiveco de Reynaldo Noll kaj Elmer Escotto, por ne paroli pri la rezultoj de la vojaĝo de Rafael Despradel – la sola esperantisto en Dominika Respubliko – al Eŭropo por deĵori ĉe la CO kaj ĉeesti UK-on kaj IJK-on.

La amerika komisiono tre dilingente laboras, sub gvido de Atilio Orellana Rojas, regule aperigante la bultenon *AktivAmeriko* kaj la dosieron *Partopreno*, kaj ekspluatante plej bone la eblojn de la retaj diskutejoj. Vigligo de la movado

en tiu regiono kaj entuziasmo por la okazonta UK en Brazilo kreis la kondiĉojn por konkretigi la eblon starigi oficejon de la amerika komisiono en Brazilo, gaste de la Brazila Esperanto-Ligo.

Azio

La sekvoj de la aktivigoj en diversaj aziaj landoj konkretiĝis dum la zagreba UK, kie kunvenis la Komisiono por la Azia Esperanto-Movado KAEM kaj decidis je en ĝi membru po unu reprezentanto el la ses landaj asocioj aliĝintaj al UEA, nome Japanio, Koreio, Ĉinio, Vjetnamio, Pakistano kaj Barato. Prezidanto de KAEM estis elektita Hori Yasuo el Japanio, kiu akceptis transpreni la gravan kaj pezan taskon. Li ankaŭ redaktos la bultenon *Esperanto en Azio*.

Antaŭeniras la preparlaboroj por la tria Azia Kongreso de Esperanto, okazonta en aŭgusto 2002 en Seulo, Koreio, kio certe estos plia sukcesa etapo en la evoluo de la movado en tiu mondoparto.

La organo de KAEM *Esperanto en Azio* rekomencis aperi en septembro 2001, dank' al prizorgado de la nova prezidanto kaj sekve de ĝia apero komenciĝis kolektado de mondonacoj por la azia fondaĵo, por ebligi novajn agadojn en diversaj landoj.

Syōzi Keiko tre lerte prizorgis projekton C, nome kolektadon de sinproponoj por iĝi individua membro de UEA pere de fondaĵo Canuto, kune kun raporto pri farita agado, tiel ke eblis akcepto de 41 homoj el kvin landoj.

La ĉefa problemo estas la kunveno de la aktivuloj, kaj la nesufiĉa ekspluatado, ĝis nun, de la retaj diskutejoj.

Arabio

La araba komisiono, kunmetita en la jaro 2000, fiksis kiel prioritaton por 2001 starigon de kontaktoj inter la unu-

opaj komencantaj esperantistoj en la tuta regiono, motivigon de la interesatoj en Jordania, kiuj petis informmaterialon de UEA, sendon de instruisto al Amman (Jordania) kaj starigon de tiea landa asocio, enkondukon de retroŝta diskutlisto, ttt-paĝoj, kaj kreadon de baza kapitalo per Fondaĵo *Araba Mondo*.

Bedaŭrinde la komisiono suferis du gravajn perdojn: la forpason de Hugo Martin, tre aktiva komisionano, kaj la translokiĝon de Kamal Chaouachi el Amman.

Pere de fondaĵo Canuto membrigis al UEA 5 jordananoj, 2 libananoj, 2 sirianoj, 1 kuvajtano, 5 alĝerianoj, 1 irakano, 1 bahrejnano, 1 UAE-ano, do entute 18 personoj.

La planoj realiĝis: fakte viglas la diskutlisto *Araba-mondo*; Wael Al-Mahdi, studento en Irbid, Jordania, ekkonstruis ttt-paĝon: www.geocities.com/waelmahdi/jea por la Jordana Esperanto-Asocio, fondita de Ghassan Al-Zohbi, Wael Al-Mahdi, Kamal Chaouachi kaj Nesrin Nabbulsi.

Dum la jaro Reza Kheir Khah vizitis kaj aktivis en Dubai, UAE; Esperanto estis instruata ĉe la Asocio por Homaj Rajtoj kaj ĉe la Asocio de Junaj Kristanoj; grupo da aktivuloj sin dediĉis al transskribo de arabdevenaj vortoj (Islamaj, geografiaj, familiaj nomoj, ktp) por transdono al la Akademio por fina beno. Jordanion vizitis Orellana por fortigi la lokan

agadon, gvidi lingvan kurson, prezenti la unuan araban studlibron de (karmemora) Abraham, danksaluti la eksministron pri kulturo Faysal Ar-Rfouh (subtenanton de la antaŭkongreso en Amman 2000), kaj por starigi kontaktojn kun Unesko-komisiono, kun Jordana Lernejo por Turismaj Gvidantoj, kaj universitato.

Jarfine estis redaktitaj la kontribuoj de la Amana seminario 2000: *Globaliĝo (Ar-Rifouh)*, *La nargileo (Chaouachi)*, *Esperanto en la mondo (Orellana)*, *Esperanto en la araba mondo (Sinno)*.

Fine ekestis paŝoj por konigi Esperanton unuoloke en la alĝeriaj medioj, kaj en norda Afriko ĝenerale.

Afriko

Pro la amplekso de la kontinento, la komisiono decidis dividiĝi en agadregionojn gvidatajn de respondecaj komisionanoj.

La plano *Prioritato Afriko* komencas realiĝi: fakte funkcias la Afrika Oficejo, prizorgata de teamo konsistanta el Gbeglo Koffi, Doumeignon Koffi kaj Raoul K. Hounnake, kaj ĝi iom post iom transprenas la taskojn de la komisiito pri Afriko, Hans Bakker. Sed kion praktike faras la oficejo? Ĝi respondas leterojn plej diversajn, organizas perkorespondajn kursojn diversnivelaĵn, disdonas subvenciojn al naciaj kaj lokaj afrikaj grupoj, ktp.

Por pli bone instrui, krom utiligi didaktikan materialon franca-kaj anglalingvan por la unua grado, farigis reta versio de la libro *Kuba ekzercaro*, kies celo estas helpi al progresantoj kaj informi novajn esperantistojn. Oni uzas la retan version de *Manlibro por novaj membroj de UEA*. La afrika oficejo rolas ankaŭ kiel eldonejo por la afrika movado; en 2001 aperis *Togolando Fabelas* kaj la kongresa Kajero de la 8-a TEK (kolekto de raportoj pri TEK de la jaro 2000).

Fine nun funkcias ttt-paĝo: www.multimania.com/afrikaoficejo; kaj la reto estas ankaŭ uzata por distribui la informilon *Tr'Afrik*, dum la bultenoj *Alvoko* kaj *Ovo* plu aperas en papera formo, redaktataj en Afriko sed presataj kaj ekspeditaj en Nederlando. Ĉefa evento de la jaro estis la UTE-kongreso, en kiu partoprenis ankaŭ kelkaj eŭropaj esperantistoj. Pli detale en la diversaj landoj: en Ganao okazis seminario; Benina Esperanto-Federacio, kiu estis akceptita kiel la 60-a Landa Asocio de UEA dum la zagreba UK, instruas Esperanton al etaj infanoj en tri bazaj lernejoj; en Tanzanio okazis tutlanda renkontiĝo; multaj kluboj en rifuĝejoj tanzaniaj kaj DR-Kongolanda; konstruiĝas Esperanto-instituto en Togolando; en Niĝerio okazas kursoj al lernantoj de privata lernejo en la vilaĝo Orod.

Eŭropo

La movado en tiu ĉi kontinento estas relative stabila. Apartan mencion meritas Unuiĝo Franca por Esperanto pro sia magazino, tre belaspekta, inteligente redaktata, tre taŭga por prezenti ĝin al eksteraj interesatoj. Francio ankaŭ organizis en Strasburgo la Junularan kongreson, sed pri tio vi legis en alia ĉapitro (p. 131). En Italio estas serioza pretigado de la 5-a Eŭrop-Unia Kongreso okazonta en Verona fine de aŭgusto, kiu promesas esti tre ĝinda.



Francaj gejunuloj antaŭ stando pri Esperanto dum la ekspozicio Expolangues en Grande Halle de la Vilette, Francio

Daŭras la zorgoj pri iuj landaj movadoj, kiel la brita.

La balkana komisiono, sub gvido de Radojica Petrović estas tre aktiva kaj enfokusigas por sia agado tre konkretajn planojn, klopodante helpi la iom malfortajn asociojn en la regiono kaj klopodante ankaŭ eniriĝi refoje Esperanton en Turkion.

Ankaŭ la pola movado, sub la gvido de Stanisław Mandrak, revigliĝas kaj refortiĝas.

En Baltio la movado estas jam tre matura, precipe en Litovio, kie la asocio ĝuas grandan prestiĝon en la socia kaj politika vivo de la lando.

Rusio jam famas en Esperantujo pro la lingvaj festivaloj, kiuj iom post iom disvastiĝas en aliaj mondopartoj, ĉiam sukcese.

Oceanio

La oceania komisiono, sub gvido de Brian Fox, komencas lagadi por esperantigi la landojn apud Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Tre aktiva en ĝi estas la antaŭa UEA-prezidanto, Kep Enderby, kiu direktas sian konatan vervon kaj viglon en tiun komisionon.

Edukado ILEI komisiita eduki



Dum la 35-a Konferenco de ILEI en Lovran estis elektita nova estraro: Jennifer Bishop, Mauro la Torre, Agneta Emanuelsson, Stefan MacGill, Boo Mee Kim Lindblom kaj Radojica Petrović.

Estrara Raporto 2001

Jam en 1990 ILEI estis komisiita de UEA zorgi pri la eduka kampo. Pluiris la Projekto Interkulturo kaj la Kvazaŭleĝejo Tibor SEKELJ. Eldoniĝis gvidilo de la lernolibro *Okuloj*. Pluaperis la periodaĵoj *Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Juna Amiko*. La 35-a ILEI-konferenco okazis en Lovran. La internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI okazigis sesiojn.

Klopodoj por revizii la ekzamenan sistemon komenciĝis. Okazigo de superaj ekzamenoj kaj instruista seminario, plibonigado de naciaj kursoj komputilaj kaj retaj, starigo de internaciaj retaj kursoj, starigado de lernoprogramoj, ktp ekokupis la respondeculojn de la eduka kampo de UEA.

ESF (Esperantic Studies Foundation) starigis la ttt-paĝon *Edukado.net*, kie estas multaj informoj pri lernado de Esperanto, instruado kaj ekzamenado.

Eksteraj rilatoj Ĉefe Unesko kaj EJJ

La ĉefaj agadoj rilate al la eksteraj rilatoj dum ĉi tiu raportperiodo temis pri Unesko (Vincent Charlot) kaj la Eŭropa Jaro de Lingvoj (Anna Ritamäki).

Apogite de la Unesko-Komisiono de Kroatio, iniciatite de Spomenka Štivec, kaj surloke kunordigite de Vincent Charlot, Rezolucio pri Kulturo de Dialogo inter Civilizoj (favore al Esperanto) estis proponita de Kroatio al la Generala Konferenco de Unesko, en oktobro 2001. Partoprenis ankaŭ Renato Corsetti, por fortigi la UEA-ĉeeston. La reprezentanto de Kroatio prezentis la malneton de la rezolucio, sed la prezento okazis tro malfrue, por ke estu tempo por organizi subtenon al la rezolucio fare de aliaj landoj. Pro tio la rezolucio estis nur mallonge diskutita en la koncerna komisiono, sed ne atingis voĉdonadon, kaj la malneto restas kiel labordokumento C/1 C/4 DR.6. Necesas prepari novan proponon al la Generala Konferenco de Unesko en 2003.

Lige al la Eŭropa Jaro de Lingvoj de la Eŭropa Unio, TEJO sukcese okazigis la 16-an Lingvan Festivalon kunordigite de Anna Ritamäki. La lingvaj festivaloj estas efikaj eventoj por tiri atenton al Esperanto. En venontaj jaroj indas aktive partopreni la Eŭropan Tagon de Lingvoj (26-an de septembro ĉiujare) deklaritan de la Konsilio de Eŭropo.

Laŭ arango de Ĉina Esperanto-Ligo, Renato Corsetti kaj Lee Chong-Yeong vizitis Beijing, Ĉinio, kaj rendevus kun Li Zhaoxing, Vic-ministro pri Eksteraj Aferoj, kaj Chen Haosu, prezidanto de la Ĉina Asocio de Amikeco kun Alilandaj Popoloj, en novembro 2001. Oni diskutis la eblan rolon de Ĉinio por atentigi UN-n pri la monda lingva problemo. Corsetti kaj Lee vizitis ankaŭ la urbon Vilnius, Litovio, en majo 2002, por rendevui kun la Ministro pri Eksteraj Aferoj kaj diskutis la eblon, ke Litovio surtagordigu la internacian lingvan problemon en la UN-Asembleo.

Okaze de la ICA 2002, konferenco de Internacia Komunikado-Asocio, kiu havas 3000 profesiajn membrojn en 64 landoj, ĉefe universitatajn profesorojn kaj ĵurnalistojn (www.ica hdq.org), la Konferenco Komitato akceptis apartan duhoran sesion, planitan de Mark Fettes, kun la titolo *Reconciliation through Communication in the Neutral International Common Language* (Repaciĝo pere de Komunikado en la Neŭtrala Internacia Komuna Lingvo), la 15-an de julio 2002, en Seulo, Koreio. Sub la prezido de Lee Chong-Yeong kvar esperantistoj (Cui Juanhua, Kimura Goro, Usui Yasuo, kaj Lee Chong-Yeong) prelegos pri la temo al ne-esperantistoj.



Ni observis, raportis kaj planis

Dudeko da esperantistoj troviĝis inter la kvarcento da partoprenantoj de tritaga konferenco de CALICO fine de marto en la universitata urbo Davis, en Kalifornio. Pro la temo, komputile asistata lingvo-lernado, Esperantic Studies Foundation (ESF) arigis delegacion de komputistoj kaj pedagogoj. Tri fest-paroloj enkondukis densan programon de prezentaĵoj, la plimulto kun praktikaj demonstraĵoj, apud kiu svarmis budoj de komercaj kompanioj. Por informoj, vizitu: www.calico.org/CALICO02/.

Atentinda estis prelego pri komputile liverata kurso de TPR (Totala Fizika Reago), kio unuavide ŝajnas kontraŭdira. Frapa estis ĝia verbo-centreco, kio karakterizas la plimulton de la demonstritaj programoj.

Jen leciono por ni: ĉe transiro de libro-bazita al komputil-bazita instruado; nia enhavo migras de statika al dinamika. Ni vidis vigan prezenton de ies matena rutino, konsistanta el amaso da praktikaj, fizikaj kaj realismaj agoj.

Ekzemple, aperas senmova vidbenda bildo de matenulo kun etendita mano, kun kvar objektoj flanke (dentobroso, glaso, kulero, viŝtuko). Oni aŭdas unu el kvar frazoj (ekz. *Liza trinkas lakton*). La lernanto devas mure kapti kaj tiri la glason ĝis la mano de Liza. Por gratuli pro la ĝusta elekto, Liza tuj vivigis kaj ektrinkas la lakton. Je miselekto, ŝi farus nenion. En alia oni stiras aŭton laŭ voĉaj ordonoj selektitaj de la programo.

La montrita bildo evoluas laŭ la stirado de la lernanto; protestante je malsekvo: *Iru maldekstren – haltu ĉe la*

halt-signo – bone vi turnis – sed, kio? Vi ne haltis antaŭ la signo! (polica serno).

Nomo ludas gravan rolon en lerno-programoj. Oni preferas uzi registritajn voĉojn ol sintezitajn. Tipe, oni permesas al lernantoj registri sian voĉon kaj kompari tion kun modela voĉo.

Parol-rekonaj programoj ekestas uzataj por funkciigo de aparatoj (*lumoj ek, televidilo – kanalo dek kvin, ktp.*) sed ili ankaŭ ekprenas didaktikan rolon. Se parol-provoj estas rekonitaj, eblas doni perfidas ŝin/lin kaj bezonas ekzercadon. Frapa projekto menciita (ne demonstrita) rekonas la malperfektan elparolon de lernanto ĉe donita teksto, diĝitigas ĝin, komparas ĝin kun la diĝita parolo de modelo kaj laŭ tio modifas la misan parolon por bonigi ĝin. Tiel, la modela prononco kiun la lernanto aŭdas kaj alcelas, venas de ties propra voĉo!

Esperante

Post la konferenco, la ESF-aro kunsidis unu tagon por plani evoluigon de perkomputila lernado en Esperanto. Ili resumis viditaĵojn el la konferenco; pro paralelaj sesioj, multaj raportis kion aliaj ne vidis.

Maturaj komercaj instru-programoj ekzistas: eldoni E-version de iu el tiuj provizus kadron kiu unuflanke faciligus la kreo-taskon, aliflanke limigus la eblojn; fariĝis pli favoraj la financaj ebloj por tio.

Oni montris instigan instruadon pere de kinejaj filmoj sur DVD, ekzemple la franca per *Chocolat*. La mult-trakaj sonaj kaj subtitolaj ebloj helpas spekti la filmon nur ĝue, aŭ en la propra lingvo (L1), aŭ en la cel-lingvo (L2), kun aŭ sen sub-titoloj (en L1 aŭ L2), kun gramatikaj atentigoj (sone aŭ skribe), kun komentario priskriba (nun ŝi paŝas al la tablo, prenas la leteron...) aŭ interpreta (ŝia mieno esprimas timon pro la enhavo...) aŭ ekzercigaj demandoj.

Tio montras vojon pli plene ekspluati la vidbendon *Pasporto al la Tuta Mondo*, kun ekzercoj, kurso kaj instruista gvidilo sur DVD aŭ en retejo (aŭ ambaŭ).

Poste oni resumis proprajn projektojn en konstruo: lern-programo de Ian Fantom (GB) *E Viva!*, el Usono *Mind Scaffolds* de Duncan Charters kaj Denis Ferland, entenanta milojn da bildoj el la siatempa bildvortaro de Benson, *Curso de Esperanto* el Brazilo, k. a. En koncepta sed demonstrita stadio estas retejo ellaborata de Hokan Lundberg, Sonja Petrović, Henning von Rosen, Clayton Smith, Arono kaj aliaj. Ĝi nomiĝas *Kursejo*, sed estas pli ol ejo por kursoj, ĝi povos fariĝi bunta *eduka bazar*. Rigardu mem: www.kursejo.net.

La partoprenantoj konsciis pri la atingoj de *edukado.net* tra lastaj monatoj. Ne estis fina decido kiun *podion* elekti/subteni; estos kunlaboro, hipersaltoj kaj dividado de materialoj inter la podioj starigataj.

Starigante edukajn retejojn, oni konsentis interalie:

- Kreaĵoj havu daŭran valoron, sed estu laŭbrike konstruataj, por ke uzeblaj eroj estu je dispono kiel eble plej baldaŭ.

- Ni kreu ĝenerale uzeblajn rimedojn kaj apogoj diversecon: estu elekteleblaj diversaj lerno-stiloj, evoluigo de

- Ni enplektu aŭtentikajn materialojn en la kursojn (ekz. tekstoj el *Monato*, *Kontakto* k.a.). Estu sonarkivoj, bildvortaroj kaj serĉeblaj saltenhavaj gramatikoj, ligeblaj al la lego-materialoj.



La konferenco montris vojojn kiel ekzemple pli plene ekspluati la vidbendon *Pasporto al la Tuta Mondo*.

- Retejoj ofertu al progresantoj gamon da lerno-programoj, estu retaj babiloj, ĉu per mikrofona/laŭtparolila konversacio, ĉu por sinkrona aŭ nesinkrona mesaĝado.
- Estu allogaj bazaj kursoj, kies fino provizas malŝlosilon al babiloj kaj aliaj faciligoj. Tiel kompletaj kursoj povos esti pli densaj kaj kontentigaj. Estu materialo por ĉiu nivelo, ĝis inkluzive por instruistoj.

- Ni enplektu aŭtentikajn materialojn en la kursojn (ekz. tekstoj el *Monato*, *Kontakto* k.a.). Estu sonarkivoj, bildvortaroj kaj serĉeblaj saltenhavaj gramatikoj, ligeblaj al la lego-materialoj.

- Ĉefrolu la pedagogio kaj ne la teknologio. Ni ne ofertu tro da teknikoj aŭ lern-elektoj al komencantoj – multaj el tiuj estos ankaŭ komputilaj komencantoj.

Tra venontaj monatoj multo progresos sur ĉi tiu kampo, ĉar la kurveninta teamo funkcios kiel laborbrigado.

Ni finu per diraĵo, trafe tradukebla al Esperanto, de festparolinto ĉe CALICO, valida por ajna instruado, sed aparte memorinda ĉe la komputila: *Nia celo ne estas transdoni lernaĵojn, sed transformi lernantojn.*

Stefan MacGill

Oratora konkurso de UEA

La Oratora Konkurso de UEA invitas partoprenantojn por la dua fojo ekde la 86-a UK en Zagrebo. Ĝi okazos dum la 87-Universala Kongreso de Esperanto en Fortaleza.

Temoj

Kial mi agadas por Esperanto? Egaleco de sekso. Ĉu Esperanto en evolulando? Lingvaj Homaj Rajtoj.

Partoprenantoj

Rajtas partopreni gejunuloj ĝis 28-jaraj, kiuj aliĝis al la kongreso. La partopreno en la konkurso estas senpaga, sed ĉiu kandidato devas, minimume unu tagon antaŭ la konkurso, sin skribe anonci al la LKK: michelson@bol.com.br aŭ al la prezidanto de la juĝkomisiono: Adonis Saliba, Rua Corinto, 543 ap. 81-B, CEP 05586-060 São Paulo (SP), Brasil, rete: esperanto@astrale.com.

Okazigo

La Konkurso okazos publike, sub prezido de la prezidanto de la Komisiono kaj en la ĉeesto de la du pliaj membroj de la juĝkomisiono. La Oratora Konkurso okazos en la Internacia Lingvo. La

kandidatoj devas paroli pri unu el la supraj temoj libere, sen anticipe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notojn. Ĉiu kandidato rajtas paroli dum proksimume 10 minutoj, sed la Komisiono povas, depende de la nombro de kandidatoj, longigi aŭ mallongigi tiun limtempon. La prezidanto de la Komisiono anoncas, antaŭ la komencigo de la konkurso, la decidon de la Komisiono rilate la daŭron de ĉiu parolado.

La Komisiono juĝos la paroladojn el vidpunktoj enhava, lingva, stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro. La konkurso okazos la kongresan jaŭdon, de la 12-a ĝis la 13-a horo. La nomo de la salono aperos en la kongresa libro.

Premioj

La premioj estas tre valoraj libroj. La gajnintoj ricevos ankaŭ diplomojn kaj iliaj nomoj estos proklamitaj dum unu el la kongresaj kunsidoj kaj publikigitaj en la oficiala organo de UEA.

Disvastigo: Informi la neesperantistojn

En Italio ekzistas eksterordinara esperantisto, Giorgio Bronzetti, kiu opinias, ke malmultaj lernas Esperanton, simple ĉar neniu parolas al ili pri ĝi.

Ĉefe la ĵurnaloj daŭre parolas nur pri la angla kaj la neceso lerni la anglan. Nu – Giorgio diris iun tagon: *kial ni ne starigas sistemon por disdoni informojn al la gazetaro en la nacia lingvo pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto?*

Ĉar li apartenas al tiu speco de esperantistoj, kiuj ne atendas ke aliaj faru sed faras mem, li komencis puŝi siajn geamikojn starigi la sistemon, kaj nun la sistemo en Italio funkcias. Ĝia nomo estas *Disvastigo* (ĝuste tiel en Esperanto!), kaj ĝi ne nur donas informojn al la gazetaro, sed ankaŭ al la parlamentanoj. Ĝi kunlaboras kun la Komunikad-Centro en Bruselo, kaj multaj aliaj.

Giorgio evidente ĉerpas siajn informojn el pluraj fontoj kaj el pluraj listoj, interalie el esperanto@yahoogroups.com, kiu liveras tiajn tradukeblajn informojn al ĉiuj esperantistoj.

Mi scias ke kelkaj landoj havas propran sistemon similan, sed estas bele, se multaj landoj celus starigi similan sistemon. Giorgio pravas pri tio, ke neniu lernos Esperanton, se neniu parolos al la publiko pri lingvaj problemoj kaj Esperanto. Ĉar neniu potenca grupo volas fari tion, eble ni mem faru kiel Giorgio.

Renato Corsetti



La konferencon partoprenis dudeko da esperantistoj. Sur la foto de maldekstre: Mark Fettes (Kanado), Grant Goodall (Usono) kaj Henning von Rosen (Danlando).



Loke

● **SANCTI SPIRITUS:** En tiu kuba urbo ekzistas vigla E-grupo, kiu havas hejmpaĝon kun informoj pri la urbo, la loka E-agado, ktp. Bv viziti la hejmpaĝon! La adreso estas: www.gratisweb.com/diaznorberto/fajabokubo.htm.

● **VALLADOLID:** Sub la titolo *Simpla, logika, neŭtrala* la ĵurnalo *Diario de Valladolid*, vendata kun la prestiĝa hispana ĵurnalo *El Mundo*, publikigis la 15-an de januaro ampleksan artikolon pri Esperanto, surbaze de intervjuo al d-rino Uruña kun atento al agado de la loka E-societo *Fido kaj Espero*. La teksto estas ilustrita per granda kolora foto de la intervjuato apud diversaj E-revuoj, inter ili la organo de UEA.

● **NUMAZU:** La 23-an de marto 2002 la alig-nombro de la korespondanta kurso fare de E-Societo en Numazu, Japanio, atingis la nombron 800.

● **PUNTO FIJO:** La 2-an de marto 2002 okazis la Unua Laborsesio pri *Homaj Rajtoj, Lingva Diverseco kaj Esperanto* en la urbo Punto Fijo (Venezuelo). Oni diskutis pri konceptoj kiel *identeco, lingvo, homaj rajtoj, diskriminacio* k.s. Pri la evento raportis vaste aŭskultata loka radio, invitante la gejunulojn lerni Esperanton kaj instigante la pluan okazigon de similaj laborsesioj.

● **TRIESTO:** Triesta E-Asocio (TEA) tradicie organizas aranĝojn okaze de Semajno de Internacia Amikeco. La lastan lanĉis kvindeko da esperantistoj la 17-an de februaro en la Germana bonfara societo en la centro de Triesto. Dezirante montri diversecon de la urbo kaj regiono, oni prezentis dekon da literaturaj verkoj en originalaj lingvoj kaj Esperanto (verkoj de Dora Pejačević, drama grupo de la Kroata

E-Unuiĝo, teatraĵoj, slovena virina koruso *Ivan Grbec* el Triesto k.s.). TEA okaze de SIA eldonis flugfolion kun bazaj informoj pri Esperanto kaj SIA. Pri la programo oni vaste informis pere de la loka gazetaro kaj du televidkanaloj.

● **KOSTARIKO:** Ekde la 3-a de aprilo denove okazas *Kurso pri Indigenaj Dialogoj* en la Politeknika de Kostariko. Entute estas 25 studentoj el plej diversaj teknologiaj fakoj. Ĝi daŭros 5 semajnojn, ĉiutagaj lecionoj okazos tri-hora leciono. José Carlos Morales kaj Gilbert Gonzales Maroto prelegos dum la

Fake

● **INFORMADIKO:** En Tutmonda Forumo de Scio pri Informadika Teknologio (<http://www.it-globalforum.org/>), en la lingvo-listo aperas ankaŭ Esperanto.

● **ĈINA RADIO:** ekde la unua de majo la Esperanto-elsendo de Ĉina Radio Internacia prove "surteriĝis" kaj estas legebla kaj aŭdebla per la retejo: <http://esperanto.cricom.cn>. Gratulaj leteroj aŭ mesaĝoj estas bonvenaj. Oni atendas aktivan ehon rilate al paĝaranĝo, enhavo kaj lingvaĵo: Esperanto-sekcio, cri-36, Ĉina Radio Internacia, Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉina Popola Respubliko, rete: "espradio" <espradio@cricom.cn>.

● **HISTORIISTOJ:** Michel Clément restartigas la reton de historiistoj, kiu estis nomata: La Internacia reto de esperantistaj historiistoj (IREH). Oni povas membriĝi enpage, sendante mesaĝon al: mclément@gmx.fr.



Persone

● **WITTEVEEN:** La 32-jara Joost Witteveen (Nederlando) eniris la teamon de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO en Roterdamo. Joost estas doktoro pri fiziko kaj sperta komputilisto; lia tasko estas prizorgi kaj modernigi la komputilon.

● **NYLÉN:** Meze de majo la anoj de la E-klubo en Väsbj, Svedio, metis florojn kun rubando *Esperanto i Väsbj memoras kaj honoras la Esperanto-pioniron* sur la tombon de Paul Nylén, por tiamaniere montri sian estimon al lia nemezurebla signifo por la sveda Esperanto-movado.

● **BROZOVIĆ:** Prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo, akademiano Dalibor Brozović publikigis en *Filologija*, prestiĝa eldonaĵo de Kroata Akademio de Artoj kaj Sciencoj, vol. 35/2002, artikolon *Slavaj elementoj en Esperanto*. La sama artikolo en Esperanta traduko de Davor Klobučar estas preparata por *Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado*.

● **REICH:** Vizitu galerion de pentraĵoj de la fama rusa pentristo, filozofo kaj sciencisto Nikolaj Reich: www.roerich.ee/nr/. La galerio havas version ankaŭ en Esperanto.

kurso. La unua pri la internacia organizado de la indigena movado, la dua pri la lukto kontraŭ la konstruado de digo en indigena teritorio.

● **PATAGONIO:** Malgraŭ la konataj malfacilaĵoj okazis en Bariloche, la 30-an de marto 2002, la dua renkontiĝo de patagoniaj esperantistoj. Oni pritraktis movadilatajn aferojn, praktikis la lingvon, la pli spertaj esperantistoj klopodis komprenigi ĉiujn paroladojn al la novlernantoj. Oni sugestis kelkajn esperantistojn por ricevi subvenciojn oferitan de Atilio Orellana Rojas. Post komuna tagmanĝo en urbocentra restoracio Ruben Sanchez faris prelegeton pri Jumeiĥo-masaĝo. La galerio, kie okazis la renkontiĝo, estas la sola loko en la urbo Bariloche, kie nuntempe ĉiun lundon oni instruas kaj lernas Esperanton.



Plie, oni povas legi tekstojn pri la historio de nia movado en la TTT-paĝo de IREH: www.er.uqam.ca/nobel/k33440/premier.html.

● **ASTRONOMIO:** Astronomia Esperanto-Klubo (AEK) celas eduki la E-publikon pri la plej antikva scienco – astronomio. La du antaŭaj staĝoj okazis en E-kulturcentro Kvinpetalo, Bureso, Francio, kaj en Observatorio de Monto Chirán en suda Francio. Ĉi-jare la staĝon akceptas konata Sankt-Mikaela Observatorio kun unika teleskopo por observadi la Sunon (diametro de la speculo 1,20 m). Neŭtona teleskopo de 60 cm kun ebloco froti astrojn per specula CCD-kamero kaj multaj pli malgrandaj teleskopoj. Gvidanto de la staĝo Patrick Lagrange denaske parolas Esperanton kaj estas unu el la plej spertaj astronomoj en Esperantujo. Pliaj detaloj: www.esperanto.org/AEK/ aŭ astroek@yahoo.com.

● **SKOLTOJ:** Skolta Esperanto-Ligo serĉas novajn aktivulojn, interalie redaktoron por la revuo *La Skolta Mondo*. Kontaktu la Ĝeneralan Sekretarion Hector Campos Grez, rete: <esperanto@terra.cl>.

● **KANTOJ:** Ĉe la TTT-ejo de Mikaelo Povorin: <http://mpovorin.narod.ru> troveblas kolekto da E-kantoj en la formato MP3 (16 kantoj) kaj en MIDI- kaj karaoke-formato (po 33 kantoj).

● **PC MASTER:** la maja eldono de la greka komputila gazeto *PC Master* enhavas artikolon pri Esperanto (p. 69) sub la titolo *Esperanto kreskas ankaŭ en nia lando*. Sub fotoj de la retpaĝo www.esperanto.gr aperas artikolo pri la historio kaj la celoj de nia lingvo. La artikolo finiĝas per kontaktoj al la Helena E-Asocio kaj la demando *Vere, ĉiel oni dirus 'PC Master' Esperante?*

Oficiala informilo



NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: Zofia Loiseau. Svedio: Wim Posthuma.

PATRONOJ DE TEJO 2002

Germanio: Ian C. Jackson; Nora Caragea. Israelo: Gian Piero Savio. Nederlando: Danny ten Haaf. Norvegio: Margrete Landmark.

SOCIETO ZAMENHOF 2002

Belgio: Michael Cwik. Francio: Clara Troper. Germanio: Elfriede Kruse. Kanado: Bruce R. Crisp; Marijke Meijer; Stevens T. Norvell Jr. Korea Resp.: d-ro Lee Chong-Yeong. Nederlando: Danny ten Haaf; Maud Meijwes; Ru H. Bossong. Norvegio: Margrete Landmark. Svislando: S. Kaufmann.

DONACOJ 2002 (EUR) ĝis la 30-a de aprilo

Fondaĵo Afriko: Germanio: Olaf C. Gruss

20,00. Svedio: J. Hammarberg 22,06; Norrköpings Esp. Kl. 51,27. Sumo ĉi-jara: 260,67.

Fondaĵo Ameriko: Aŭstralio: Esp. Fed. de N.S.K. (kuba kongreso): 303,03. Brazilo: N.P. Mendes (kuba kongreso) 9,51; N.P. Mendes (Addano) 25,00. Britio: A.M. de Gomis (kuba kongreso): 96,00. Finnlando: A. Karkkainen (Addano) 20,00. Germanio: J. & P. Gersonde (Addano): 50,00. Kostariko: A. Leoni Leon (kuba kongreso): 16,00. Nederlando: E. Burg (Addano) 50,00; W. van Ganswijk (Addano): 25,00. Svedio: J. Hammarberg 11,03. Sumo ĉi-jara: 1826,72.

Fondaĵo Azio: Japanio: S. Yosikawa 17,06. Sumo ĉi-jara: 2241,00.

Fondaĵo Canuto: Francio: M. Basso 12,00; G.G. Chaumereuil 150,00; J.-F. Clet 38,00; R. Hardy 30,00; M. Massemin 18,00; P. Segur

18,00. Israelo: K. Sicherman 50,00. Nederlando: T. van Huis-Stariŝky 25,00; A.E. Moerbeek-Prins 75,00. Sumo ĉi-jara: 1281,50.

Konto Espero: Francio: G. Bon 20,00. Germanio: M. Westermayer (Lingvo de Paco = LdP): 45,00. Irlando: Esperanto-Asocio de Irlando (LdP): 30,00. Japanio: (ĉiuj LdP): H. Egawa 42,96; Nagoya Esperanto-Centro 85,91; T. Osioka 46,39; M. Takezaki 85,91. Y. Touzjo 8,59; S. Yamasaki 42,96. Nederlando: T. van Huis-Stariŝky 50,00. Svedio: T. Johansson 55,13. Sumo ĉi-jara: 3921,31.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Francio: M. Basso 6,00; J.-F. Clet 50,00. Sumo ĉi-jara: 555,75.

Ĝenerala Kaso: Britio: L. Mee 50,00. Germanio: A. Masuhr 29,10. Nederlando: W. Akkerman 23,00; P.A. Buijnsters 6,00. Sumo ĉi-jara: 1327,47. Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Anoncetoj

1 vorto = 1 internacia rpĉ (€ 0,75). Ni ne respondacas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Korespondanta Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.



KOLEKTADO: Kun la celo disvolvi kolektadon per Esperanto kaj Esperanton per kolektado estis fondita reta listo "per-esperanto-kolektado". Por aparteni al la listo sufiĉas sendi malplanan mesaĝon al per-esperanto-kolektado-subscribe@yahoo.com aŭ skribi rekte al la prizorganto esperanto@coll.telecom.com aŭ al progresante@yahoo.com. La mesaĝojn bv. sendadi al per-esperanto-kolektado@yahoo.com.

30-JARA JUNULO, komencanto, interesiganta pri muziko, legado kaj promenado, dez. kor. kun junaj esperantistoj el Francio, Svislando, Beneluko aŭ Afriko: Yannick Dalzon, 1 Le Regain, FR-38540 Grenay, Francio.

DEZ. KORESPONDI TUTMONDE: 20-jara afgana f-ino Mojghan Vatanpur, Buluk-e 2, Shahrak-e Seyd ol Shohada, Kh: Babai, Yaft Abad, Tehran, Iran; 15-jara afgano Esmail Vakili, No:4, K: 4 Garbi, Kh: Fakuri, Ashrafi Eshfeh, Punak, Tehran, Iran; 21-jara afgana s-ino Malihe Vakili, No: 4, K: 4

Garbi, Kh: Fakuri, Ashrafi Eshfeh, Punak, Tehran, Iran.

LECIONOJ PRI LA ITALA LINGVO: Senpagaj lecionoj pri la itala lingvo, verkitaj en E-o, haveblas retpoŝte ĉe Massimo Ripani <Xenoitaly@hotmail.com>.

TRADUKEMULOJ de ampleksaj latinliteraj tekstoj havigu al si senpagajn nelingvecan traduk-asistan makroon de <derksesp@cs.com>.

HANDIKAPITA PARO Sylvie Rodriguez kaj Thierry Cheverau kolektas poŝtmarkojn tutmonde, afrankitajn aŭ ne: A.S.-L' Aquitaine / S. Rodriguez, Rés. S. Formanoir, Bat.2, ap.172, ent 119, 33600 Pessac, Francio.

ESPERANTISTA KOOPERATIVO D-ro Zamenhof en Ruse, Bulgario, dez. trovi korespondamikojn por siaj membroj, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj pere de retpoŝto: stcankov@vikek.net.

DEZ. KOR. TUTMONDE kaj int. PM-ojn Laura Lukoŝevičiūtė (18 j.), Taikos gt. 79-32. LT-4919 Utena, Litovio.

KOMENCANTA ESPERANTISTO, 24-jara, int. pri fremdaj lingvoj, psikologio, literaturo, muziko kaj komputilo, dez. kor. kun diverslandanoj por praktiki la lingvouzon kaj havi geamikojn en diversaj landoj: Dariusz Piatkowski, rete: p.dariusz@wp.pl.




La perfido de Jehoŝua bar-Jozefo

La tago kiam Jesuo perfidis Judason. Romano. Manuel de Seabra (1932). Vieno: IEM, 2001. 135 p. ISBN 3 901752 20 X. 23 cm, € 11,10.

Ĉu eblas trakti la vivon de Jesuo kiel historian romanon kaj aldoni samtempe ion novan? Manuel de Seabra pravas en sia nova romano *La tago kiam Jesuo perfidis Judason*, ke lerta verkisto ja povas fari tion. La strukturo de tiu verko estas tre neordinara, ĉar ĝi komenciĝas per epilogo, sekvata de prologo. Por la daŭrigo li bezonas nur 25 liniojn.

De Seabra ŝatas elmontri sian eruditecon, sed brilas tute sen bezono, ĉar detaloj, kiuj plaĉas precipe al filologoj, ne decidas pri la funkciado de la novelo. Por doni pli da aŭtentikeco al sia rakonto, li uzas kiel eble plej ofte formojn, kiuj similas al la originalaj nomformoj. Tiel la titola Jesuo tute ne aperas en la romano, kie ni konatiĝas kun la migranta predikanto Jehoŝua bar-Jozefo. Jehoŝua ĉerpis sian mondkoncepton el egiptaj (aŭ misraimaj) fontoj. Tiu koncepto sendube plaĉas al ajnaj nuntempaj religiaj alternativuloj. Felice romanverkanto ne devas pruvi siajn hipotezojn.

Kiam Jehoŝua komencis sian agadon kiel migranta predikanto en Judeo, tiu lando similis al kaldrono de sektaj politikaj kaj religiaj. Ĉiuj atendis la Mesion, kiu restarigu dian



ordon, aŭ almenaŭ forpelu la romianojn el sia lando. En tia socio la mesaĝo de Jehoŝua ŝajne estis ambigua. Kion li opinias ekzemple, kiam li eldiris en la templo de Jerusalaŭm svingante senĉese la skurĝon: *Mi detruos tiun ĉi sanktejon kaj dum tri tagoj mi ĝin rekonstruos!*

Ĉiuj haltis konfuzite (p.13). Kompreneble tiaj deklaroj estis konfuzaj por la samtempuloj de Jehoŝua. Postaj generacioj aldonis teologian interpretadon (vidu *Evangelio laŭ Johano 2:21*). Tial la leganto demandas sin, ĉu Jehoŝua eble ne plene komprenis la implikojn de sia predikado. Eble Judaso, la Sikaro, (aldona noto klarigas, ke sikaro) estis ekstremistaj zelotoj) ja estis pli fidela al la origina mesaĝo de Jehoŝua – la leganto juĝu mem kiu perfidis kiu.

De Seabra verkas ne precipe por religiemuloj, sed por kredantoj kaj nekredantoj. La plej esenca afero estas, ke ni renkontas Jesuon kiel homon kiel li povintus esti en siaj samtempaj kondiĉoj kaj en tiu senco la romano bone funkcias, eĉ por leganto, kiu - kiel mi - apenaŭ konas la originajn fontojn de la jehoŝuaa kredo. Wolfgang Kirschstein

Birdo kantas laŭ sia beko

Flugu falko. Kompakta disko, 21 titoloj, 46 minutoj. Elizabeth Díaz, Štefan Ternóczy kaj infana ĥoro Olé. Trad. Eduard V. Tvarožek, Bratislava: ESO, 2001, kun tekstokajero, € 18.

Por tiuj, kiuj ŝatas popolan muzikon, jen bela disko de ok slovakaj kantoj, unu originala Esperanta kanto kaj dek du bone konataj kantoj el pluraj landoj, subtila miksaĵo de muziko en variaj humoroj.

Plejparte kantas Elizabeth Díaz el Kubo. Ŝi havas tre maturan voĉon (eble tro matura por folkloro kantado). Bone ke akompanas la diskon broŝureto, kiu enhavas la tutan tekston, ĉar ofte la diazaj vortoj ne estas klare distingeblaj.

La aliajn kantojn prezentas junula ĥoro Olé kaj solistoj el ĝi. Iliaj vortoj estas tre klare prononcitaj kaj la voĉoj estas malpezaj kaj freŝaj. En nur unu kanto, *Sankta Luĉio*, kantas, unu post la alia, Elizabeth kaj junulo. Laŭ mi, la troa kontrasto inter la voĉoj iom ĝenas. La elekto de la slovakaj muziko estas bona; la kantoj estas ĉarmaj – ekzemple tiu, el kiu la disko prenas la titolon, *Flugu falko*, kiun mi tre ŝatis. Du rapidaj kantoj gajigas la aŭskultanton. *Dancu* kaj *Knabineto*, kvankam *Dancu* estas en tro malalta tonalo por la junaj voĉoj. Bele



akompanas la voĉojn pianisto Štefan Ternóczy, kelkfoje sur elektronika klavaro anstataŭ piano.

Pri la alilandaj kantoj: mi ŝufice ĝuis ilin, krom la tri banalaj, gurditaj, tro ofte kantataj melodioj, *Mia Bonnie* (Bonni), *Bonan nokton* kaj *Si venos* (laŭ montaro). Mi trovis *Gvantanamera* kaj *Katjuŝka* tro rapidaj. La nov-komponitaj kantoj estis tre ĝojaj kaj plezurigaj.

Ne konante la slovakon, mi ne povas juĝi la tradukojn de la tekstoj, sed la alilingvaj bone sonas kaj taŭgas por la ritmo de la muziko. La originala *Macko*, fare de karmemora poeto Eduard Tvarožek, estas ĉarma historieto pri ursido, kiu ŝtelas mielon de abeloj, kiuj instrueme pikas ĝin.

Por resumi – tiu ĉi bele produktita disko enhavas buntan kolekton da kantoj el variaj landoj, kiu montras kontraston de junaj, freŝaj voĉoj de la ĥoro Olé kaj la pli profunda matura voĉo de Elizabeth Díaz, ĉiuj taŭge akompanitaj de lirika piano.

Máire NicAoidh

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 2,25 eŭroj). Antaŭdankon por via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Bases de l'espéranto d'après le fundamento, Les. Marc Bavant. Dobřichovice: Kava-Pech, 2002. 115p. ISBN 80 85853 56 6. 20cm. Sinteza kaj moderna prezento de la Fundamento por franclingvanoj. € 11,70.

Ekonomio sen rento kaj inflacio. Krei mon-sistemon kiu funkcias por ĉiuj. Margrit Kennedy. El la angla trad. Märtha Andréasson k. a. Skövde: Al-fab-et-o, 2001. 80p. 20cm. Ilus. € 6,30.

Esperanto-Grammatik. Eine Lerner- und Referenzgrammatik. Dirk Willkommen. Hamburg: Helmut Buske Verlag, 2001. 136p. ISBN 3 87548 244 1. 23cm. Moderna science ellaborita superrigardo, kun ampleksa bibliografio kaj indekso. € 19,80.

Fakso al la savinto aŭ Luizo IV en Beĝio. Lajos Körmenyi. El la hungara tradukis Tibor Papp. Debrecen: Hungaria E-Asocio, 2002. 82p. ISBN 963 650 066 5. 21cm. Ilus. Taglibro-romano pri vivĝoj de multe suferinta knabeto. € 4,20.

Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj. Robert Phillipson. Rotterdam: UEA, 2002. 19p. 21cm. E-dokumento n-ro 37E. € 2,10.

Triona rabato ekde 3 ekz-oj.

Johann Martin Schleyer (1831-1912). Ein Menschenfreund und Akte seiner heroischen Liebe. Aloisia Billinger. Postparolo R. Haupenthal. Schliengen: Edition Iltis, 2002. 50p. ISBN 3 932807 25 1. 21cm. Represo

Amika E-Rondo, 1986/2002. 173p. 15cm. Alfabeto ordigita frazaro kun ampleksa suplemento. € 3,00.

Perlen der Himmelskrone Mariens. Sonettenkranz, aus Lobsprüchen heiliger Seelen gewunden. Johann Martin Schleyer. Postparolo de

Vladimír Váňa. Ilustraĵoj Pavel Rak. Dobřichovice: Kava-Pech, 2002. 128p. ISBN 80 85853 54 X. 20cm. Dudeko da mallongaj, spritaj rakontoj, inter kiuj kelkaj premitaj. € 9,90.

Skandalo pro Jozefo, La. Valdemar Vinař. Ilustraĵoj de Radim Vácha. Dobřichovice: Kava-Pech, 2002 (2-a eld.). 88p. ISBN 80 85853 50 7. 21cm.

Bindita. Originala, drameca prilaboro de la biblia rakonto pri Jozefo, jam tradukita el E-o en la ĉeĥan kaj japanan. € 10,80.

Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970-1980. Tekstoj de la konkurso de la Premio Miyoshi 2001. N. Aleksiev, D. Cibulevskij, G. Maertens, D. Quirke, W. De Smet. Kalmthout: Sonorilo, 2002. 80p. ISBN 90 77066 03 9. 30cm. € 9,00.

Vereinfachung und Erleichterung der musikalischen Notenschreibung. Ein Vorschlag. Johann Martin Schleyer. Postparolo de N. Breyer. Schliengen: Edition Iltis, 2002. 24p. 30cm. Represo de la eldono el 1902. € 7,80.

Zur Frage der Einführung einer internationalen Verkehrssprache. Ludwig Zamponi. Postparolo R. Haupenthal. Schliengen: Edition Iltis, 2002. 72p. ISBN 3 932807 27 8. 21cm. Represo de la eldono el 1904. € 9,90.



de la 2-a eldono el 1911. € 6,60.

Laŭ la fluo de l'interparolo. Konversacia gvidlibro franca-Esperanta. Lucien Bourgeois. Beauville:

R. Haupenthal. Schliengen: Edition Iltis, 2002. 54p. ISBN 3 932807 28 6. 18cm. Represo de la eldono el 1868. € 6,60.

Rakontoj ne nur ŝercaj.

RET-INFO Retpoŝto Esperanto-novaĵservo
<http://www.eventoj.hu> ret-info@esperanto.org

Ottlie BÜRGER forpasis la 10-an de novembro 2001 en sia 92-a vivjaro. Ŝi estis multjara membrino de la E-grupo en Linz, Aŭstrio.

David FEATHERSTONE (1923-2002), E-instruisto kaj reprezentanto de Asocio de E-instruistoj en Britio, fakdelegito de UEA pri biblioj kaj deservoj, estrarano de Kristana Esperantista Ligo Internacia, forpasis la 8-an de marto 2002.

D-ro Emil FEIST (1907-2002), dumviva membro, iama fakdelegito pri administrado, mortis la 22-an de novembro 2001.

Manfred FÜHRER (1933-2002), germana aktivulo kaj delegito pri kemio, disvastiganto de E-literaturo per propra libroservo (kune kun sia filipina edzino), mortis la 21-an de februaro en Santa Barbara, Filipinoj.

Reinold HUBER (1937-2002), dumviva membro, mortis la 28-an de januaro en Salzburg-Gnigl, Germanio.

Adalberto HULES, poeto (*Katoj kaj ĉevaloj*, 1982), tradukisto, kontribuinto al la revuo *Hungara vivo*, mortis la 14-an de marto en Hungario.

Duŝanka KACĀREVIĆ (1905-2002) mortis en Beogrado, Jugoslavio, komence de marto. Ŝi estis instruistino, lernis Esperanton ĉ.1950, por poste gvidi plurajn kursojn, aktivi en la loka kaj regiona movadoj, i. a. kiel sekretario (1957-1962) de Serbia E-Ligo. Ŝi membris en UEA dum pluraj jardekoj kaj estis landa peranto de SAT (1963-68).

Jan KUSTER (1920-2002): fakdelegito pri ornitologio, aktiva kursgvidanto kaj movadano, forpasis 81-jara.

Werner LAEDERACH-Emmes (1912 -2002). Li prezidis la lokan kongresan komitaton de la 64-a UK en 1979 en Lucerno kaj estis dum multaj

jaroj estrarano de Esperanto-Societo Zuriko. Li gvidis nombrajn kursojn kaj dum longa tempo estis motoro de la E-Societo Zuriko.

Heinrich NISCHWITZ (1907-2002), honora membro de GEA, esperantisto de sia 15-a jaraĝo, mortis la 12-an de marto. En 1926 li iniciatis la fondon de Suda Ligo (laborunuigo de esperantistoj en Badeno kaj Virtembergo), estraro de Germana Esperanto-Asocio (1954-1983). Mecenato, i. a. kiel membro de Societo Zamenhof.

Heinrich PETER (1911-2002), esperantisto de 1937, dumviva membro, mortis en Vieno, Aŭstrio.

Alex PHILIP, dumviva membro, iama volontulo en CO, mortis la 7-an de marto en Osoyoos, Kanado.

Franz SCHICK, kunfondinto de la postmilita Kolektivo Esperantista Komunista kaj ties honora prezidanto, multjara redaktoro de *Internacisto*, mortis la 9-an de marto.

Eriko SUNARDO, antaŭa nomo Khwat Liat Kho (1927-2002), indoneziano, diplomato, aktiva esperantisto de sia junaĝo, dumviva membro, mortis en Aŭstrio, kie li loĝis dum la lastaj dudek jaroj.

Clément THOLET (1923-2002), estrarano kaj poste ĝen. sekretario de Mondpaca Esperantista Movado, mortis ĉi-januaru en Saive, Belgio.

Edward William WOODRUFF (1905-2002), dumviva membro, delegito ĝis 1996, membro de Societo Zamenhof, sekretario de LKK por la 69-a UK en Kanado, mortis en Vancouvero, Kanado.




Krucenigma konkurso

la kaŝitan proverbon bv. sendi ĝis tri monatoj post la apero (poŝte, fakse aŭ rete) al la redakcio.

Solve el la februara numero: *Kelktempa ĉeso ne estas forĝoso. Malbona virino diablon superas.*

La solvojn sendis (malgraŭ tio, ke mise ne estis indikite fari tion!): André Léval, Nora Caragea, Roma Thorsen, Jean-Marie Ries, Julien Ducrocq, Dieter Dungere, Valentin Melnikov, Pavol Petrik, Paul Lafont, Dieter Rooke, Astrid Birkbah, Neal McKown, Berto Schumann, Raoul K. Hounnake, Kivajev Jurij Petroviĉ, Hu Guozhu, Pieter Jan Doomen, Tatjana Auderskaja, Erkki Kempainen kaj Denise Hubert.

La libropremion gajnis: Hu Guozhu el Ĉinio. Elkoran gratulon!



AŬTORO: KIVIO

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

Ĉiuj estas gazeto por ĉiuj kiu serĉas interesan legadon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke ĉiuj estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 2002 aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

Aŭstralio	32 dolaroj	Francio	19 eŭroj	Nederlando	19 eŭroj
Aŭstrio	19 eŭroj	Germanio	19 eŭroj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	19 eŭroj	Hispanio	19 eŭroj	Pollando	9 eŭroj
Brazilo	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugallio	19 eŭroj
Britio	12 pundoj	Italio	19 eŭroj	Svedio	185 kronoj
Danio	140 kronoj	Japanio	2090 enoj	Svislando	28 frankoj
Finilando	19 eŭroj	Kanado	27 dolaroj	Usono	18 dolaroj

Granda rabato por grupaj abononj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Fabeloj, mirindaĵoj kaj internaciaj rakontoj sur pli ol 400 paĝoj...

"Unika legolibro, plej bonveniginda kaj rekomendinda al ĉiuj studentoj de la Internacia Lingvo."
Bullus Agnassoon

Rotterdam: UEA, 1993 (dua korekta eld.). 431p. 21cm.
Prezo: € 13,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

REMEMOROJ PRI HOLOKAŬSTO

MASKERADO ĈIRKAŬ LA MORTO. Nazimondo en Hungarujo (1965). Tivadar Soros (1894-1968). Redakto kaj komentario de H. Tonkin. Rotterdam: UEA, 2001 (2-a eld.). 318p. ISBN 92 9017 073 5. 21cm. Prezo: € 24,00.

La rememoroj de T. Soros pri la holokaŭsto en Budapeŝto, estis en 1965 verko "kulture vere trarompa, ne simple io nova en Esperanto, sed io nova entute" (H. Tonkin). Jena dua eldono havas ampleksan komenton kaj detalan indkson.

UNIKE VASTA PANORAMO

Unike vasta panoramo al la dilemoj de la nuntempa mondo. Aperigante tiujn ĉi referaĵojn en Esperanto UEA demonstris sian ligitecon al la streboj de Unesko pri kulturo kaj prezentis al E-parolantoj legaĵojn kiuj helpas meti la strebojn kaj celaron de la E-movado en pli vastan kuntekston. (Vilmos Benzcik, Esperanto 1999: 12)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. Trad. Johano Rapley. 1998. 60p. ISN 92 9017 59 X. 21cm. € 6,90.

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Andrew O. Ureybu. Trad. Johano Rapley. 1997. 63p. ISBN 92 9017 053 0. 21cm. € 6,90.

KULTURO KAJ SANO. Mervyn Claxton. Trad. Helga Rapley. 1999. 42p. ISBN 92 9017 060 3. 21cm. € 5,40.

Triona rabato por samtempa aĉeto de ĉiuj tri librotoj aŭ de 3 elz. de sama libroto. Menu ĉe la Libroservo de UEA.

KLEKS en sia nigra serio prezentas...

MARTA
de Eliza Orzeszko, en traduko de Zamenhof

Junulino luktas por digna vivo en pasint-jarcenta Pollando. "La rakonto progresas rapide, kaj la leganto nepre emplektiĝas en la tragedian rakonton... ne nur specimeno el la frua historio de Esperanto" (Anna Löwenstein).

Bielsko-Biala: KLEKS, 1999 (5-a eld.). 256p. Bindita. € 12,00.
Triona rabato ekde tri ekz. ĉe la Libroservo de UEA.

Mazi estas denove aĉetebla!



La plej sukcesa vidbenda kurso, esperantigita laŭ sukcesa metodo de la prestiĝa BBC, estas denove en la merkato, ĉi-foje kontraŭ duona prezo de EUR 39,00 (antaŭe NLG 180 = EUR 81,68).

MAZI EN GONDOLANDO

Verkita de Wendi Harris. Esperantigis Roman Dobrzyński, Mila van der Horst-Kolińska, Stefan MacGill kaj Andrzej Pettyn. Den Haag: Internacia Esperanto-Instituto, 1995. Intergeneracia kurso de Esperanto por infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj. La kompleto konsistas el 2 vidbendoj (180 minutoj entute) en PAL-sistemo, tekstolibro (159p) kaj sonkaseto (ekzercoj).

Krome, ekster tiu kompleto mendeblas aparte ankaŭ:

Ekzerco kaj ludu


Aktiviga libro de Barbara Cmielewska, 94+5p. 24cm. Plenkolora presita sur kartoneca papero; ringe bindita. Prezo: EUR 7,80. Ankaŭ la baza tekstolibro de la kurso estas aparte mendebla — prezo: EUR 7,50.

La Libroservo de UEA estas la ĉefa distribuanto de la tuta Mazi-materialo. Ni donas trionan rabaton por samtempa mendo de minimume 3 ekz. de la sama ero. Kiel kutime, aldoniĝas 6% da imposto (nur por la loĝantoj de EU) kaj 10% por sendokostoj.

“Pasporto” al 83 landoj

La plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj *Pasporta Servo*, aperas ekde 1974. Ĉi-jare ĝi enhavas 1231 gastigantojn el 83 landoj, sur 207 paĝoj.

La gastigantoj ricevas ĝin senpage. La aliaj povas ĝin mendi je 15 EUR (kun triona rabato ekde tri ekz.).




Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de UEA aŭ de la landaj organizantoj. La aliĝa limdato estas la 1-a de novembro. La gastigantoj ricevos memorigilon en aŭgusto.

Pliaj informoj ĉe la kompilinto: Derk Ederveen, Westenburgstraat 15, NL-2275 XR Voorburg, Nederlando.

KLASIKA VOJAĜLIBRO

Antaŭ 700 jaroj Marko Polo vojaĝadis vaste de Zanzibaro ĝis Ĉinio, landoj plenaj de mirindaĵoj por tiutempa eŭropano. Liaj spertoj restis influa fonto de informoj kaj inspiro tra jarcentoj. Per sia verko Marko Polo kreis ponton inter

du ĉefaj kultursferoj de la tiama mondo. Ĝia Esperanto-versio, en verba traduko kaj klera prizorgo de Daniel Moirand, trovis naturan lokon en la serio *Oriento-Okcidento*.



LA LIBRO DE LA MIRINDAĴOJ AŬ LA PRISKRIBO DE LA MONDO. Marko Polo (1225-1324). Esperantigis Daniel Moirand. Rotterdam: UEA, 2001. 445p. ISBN 92 9017 075 1. 21cm. Ilus. Serio "Oriento-Okcidento", n-ro 34. Prezo: € 33,00.